# KONGRESO DE LA POPOLOJ

*Laŭ la franca, esperantigis: Jacqueline Lépeix.*
*Lingve kontrolis: Georges Lagrange.*
*Eldonis: la broŝurservo de S.A.T.*
*Esperanto, F 47470 BEAUVILLE*
*1994.*

***En la sama serio:***

*Andrée GAYMARD-ROLLET,* ***Por Tutmonda Civitismo***
*La necesa civitana edukado (76 paĝoj)*

*Guy MARCHAND,* ***Unu aŭ Nul***
*La Mondo aŭ estos tutmondista, aŭ ne plu estos (120 paĝoj)*

# KONGRESO DE LA POPOLOJ

**LA KONGRESO DE LA POPOLOJ**
**ESTAS ANTAŬBILDO**
**DE DEMOKRATE ELEKTITA**
**TUTMONDA ASEMBLEO DE LA POPOLOJ**

15 Rue VICTOR DURUY, F 75015 PARIS
Tel. 531.29.99

# MONDANISMO

La MONDANISMO estas la tuto de la ideoj kaj agoj esprimantaj la solidarecon de la terloĝantoj kaj celantaj estigi supernaciajn instituciojn kaj leĝojn kun federacia strukturo, komunajn por ili, en la respekto al la diverseco de la kulturoj kaj popoloj.

La MONDANISMO estas ankaŭ scienca aliro al la interindividuaj sociaj fenomenoj rigardataj mondskale.

La MONDANISMO klopodas proponi novan politikan organizadon de la homaro, implicantan la transŝovon de kelkaj partoj de la nacia suvereneco al Tutmonda Federacia Aŭtoritato, kapabla solvi per decidoj de la plimulto la problemojn, kiuj pridecidas la destinon de la homa specio, ekzemple: milito, malsato, poluado, superpopolado kaj energio.

La MONDANISMO, pro siaj supernaciaj postuloj, ne povas kontentiĝi per la nesankciataj devontigoj de la internaciaj traktatoj kaj akordoj.

## LA INICIATINTOJ DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

*Alfred RODRIGUES-BRENT, naskita en 1898, ĵurnalisto, famiĝis kiel nederlanda rezistanto dum la lasta milito. Li partoprenis tre multajn internaciajn kongresojn, en kiuj oni pridiskutis la mondanistajn tezojn. Pensulo, li konceptis la planon "Kongreso de l'Popoloj". Kiel ĝenerala sekretario de la Komitato de la Kongreso de l'Popoloj, li zorgis pri ties unuaj paŝoj.*

*Maurice COSYN (1901-1968) estas unu el la personoj, kiuj plej markstampis la mondanistan agadon ekde 1946. Dum 25 jaroj li estis la animanto de la Federalista Unuiĝo de Belgio, kies bultenon "L'Arc-en-Ciel" (Ĉielarko) li redaktis preskaŭ sola. En tiu periodo ne estis multe da pacistaj, kontraŭatomaj kaj mondanistaj agadoj, kiujn li ne partoprenis, aŭ kiujn li mem ne organizis.*

*Jacques SAVARY (1913-1964), verkisto, pentristo kaj poeto, kontribuis en la du Amerikoj kaj en Eŭropo al fondo de pluraj asocioj celantaj defendi pacismon, lukti kontraŭ monda mizero kaj por mondanismo. Li estis unu el la animantoj de la Universala Movado por Monda Konfederacio ; poste, dum 7 jaroj, ĝenerala sekretario de l' Monda Konsilantaro por Monda Konstitucianta Asembleo. Li relanĉis la Internacian Registrolibron de l'Mondcivitanoj kaj publikigis bultenon "Monda Demokratio" kies sola redaktisto li estis. Lia influo estis sentita en ĉiuj mondanistaj agadoj de 1950 ĝis 1964. Li redaktis la alvokon (vd. p.10), kiun poste subskribis 13 mondfamaj eminentuloj.*

## LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

## ESTAS ANTAŬBILDO DE TUTMONDA ASEMBLEO

## DEMOKRATE ELEKTITA

La mondanistoj ne povas fidi al la suverenaj ŝtatoj por krei la Konstituciantan Asembleon de la Popoloj, la nuran, kiu havigus al la homaro la rimedojn por certigi la pacon kaj venki la mondan mizeron. La mondanistoj devas do ekpreni siajn aferojn per propraj manoj kaj mem progresive krei la Asembleon reprezentan de la Monda Popolo : jen la baza ideo de la projekto pri la KONGRESO DE LA POPOLOJ.

En demokrata organizado, la voĉdonado estas organizata laŭ diversaj niveloj :

- skale de la komunumo por solvi la komunumajn problemojn;
- skale de la regiono por solvi la regionajn problemojn;
- skale de la nacio por solvi la naciajn problemojn.

Sed ne estas monda reprezentado por solvi la mondajn problemojn : malarmado, malsato, poluado, energio, superpopolado.

Tial la mondanistoj entreprenis mem organizi tiujn transnaciajn balotojn. Temas pri **"laboratoria laboro"** realigata de kelkaj personoj en la mondo, sen monaj rimedoj. Sed tiu eksperimento de la Kongreso de la Popoloj pruvas, ke eblas organizi demokratan voĉdonadon planedskale. Se iam la registaroj finfine ekkonscios pri la kreskanta danĝero kaj volos agi, ĉar ja ili havas por tio la rimedojn, tiam la procedo estos facile ekfunkciigebla.

# KIAL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ ?

En la mondo, en ĉiuj epokoj, la plimulton de civitanoj estris eta malplimulto. Antaŭ du jarcentoj, ĝis estiĝo de demokrataj ŝtatoj, regis aŭtokratio. La pasintaj reĝimoj solvis la problemojn inter si, kvazaŭ "de monarko al monarko", sen konsulto de la popoloj. Post apero de demokratioj, post naskiĝo de Naci-ŝtatoj, la solvo de la problemoj fariĝis internacia, sed fakte nenio ŝanĝiĝis : tre eta malplimulto estis decidpova rilate militon aŭ pacon, sed la popolo ne partoprenis la decidon.

Ĉirkaŭ la fino de la 19-a jarcento, la ŝtatestroj opiniis necesa la sekurigadon de la paco. En Hago (1899) ili aranĝis konferencon, kiu fiaskis ; dua okazis ankaŭ en Hago (1907), sed ĝia nura rezulto estis la mondmilito 1914-1918. Post tiu terura milito oni kreis, kun espero konservi la pacon, Ligon de la Nacioj, bazitan sur la naci-ŝtataj suverenecoj kaj sen popola subteno. Pro tio ĝi estis nepre fiaskonta kaj dronis en la milito 1939-1945, ankoraŭ pli abomena ol la antaŭa. Post tiu milito, sama reago : naskiĝis organizaĵo de la Unuiĝantaj Nacioj, same ne kapabla kiel la tri antaŭaj provoj, sekurigi pacon, ĉar ĝi prezentas la samajn mankojn : nepra respekto al la nacia suvereneco, ekskludo de ĉia subteno fare de la popolo.

Ĉiam, ĉiuj oligarkioj, ĉu teokrataj, ĉu demokrataj, agas same, kunigante siajn proprajn suverenecojn, neniam delegante iun parton profite al supera organismo kapabla, kun senpera popola subteno, garantii pacon.

Nuntempe, ju pli potenca estas iu naciŝtato, des pli ĝi ŝarĝas sin per "internaciaj devigoj", des pli ĝi emas krei kaj plifortigi blokon kun satelitaj nacioj, kiujn ĝi strebas

superregi. Ankaŭ la naciŝtatoj malpli potencaj strebas por defendi siajn politikajn kaj ekonomiajn utilojn, superregi malpli fortikajn. Tiel stariĝas, fakte, malfirma monda hierarkio de nacioj.

La internaciaj kunvenoj, ĉe la ministra nivelo kie traktiĝas decidoj devigantaj ŝtatnaciojn mem, povas nenion kontraŭ la mankoj de la nuna mondorganizado. Nu, ŝanĝi tute kaj subite ĉi tiun estas neeble, tial ĉar ĉiuj naciaj estraroj estas samtempe gardistoj kaj kaptitoj de la sistemo.

Sed konstituigi, paŝon post paŝo, novan sistemon apud la malnova, tio ja estas ebla. Tiel disvolviĝas plej ofte la homaj evoluoj. La malnovo ne malaperas subite, kiam la novo prezentiĝas. Ĉu temas pri mekanismo, ĉu pri metodo, ĉiam la malnova kaj la nova ekzistas flankon ĉe flanko dum kelka tempo.

La novaj faktoj de nia epoko estas : la disvolviĝo de la tekniko, la plivastigo de konscio pri homa solidareco kaj mondcivitaneco.

Baziĝante sur tiuj faktoj, la nova transnacia metodo devos esti establita por postveni la nunan internacian organizon. La nepra kondiĉo de sukceso estas, ke oni povu labori trans la landlimoj. Do la organizo devas esti transnacia kaj ne supernacia, en la signifo de arigo de iu nombro da ŝtatnacioj en suverenan blokon, tiel konsistigantan novan hierarkion.

Fronte al la ripetitaj fiaskoj de la ŝtatnacioj, kelkaj pensuloj serĉis solvon. Ekzemple, inter la du mondmilitoj, du usonaninoj, Lola M. Lloyd kaj R. Schwimmer, lanĉis en 1924 la ideon pri Popola Konstitucianta Asembleo, konsistanta el delegitoj elektitaj en la tuta mondo, po unu delegito por miliono da loĝantoj, kaj ŝarĝita redakti Mondan Konstitucion.

Post la dua mondmilito, tiu ideo estis adoptita de kelkaj personoj, inter kiuj usona advokato de Tennessee, Fyke Farmer, kiu proponis okazigi samtempe la balot-

elektojn por la Popola Konstitucianta Asembleo kaj parlamentajn balotojn de la diversaj landoj. La Tenesia ŝtato adoptis leĝon tiucele. La balotelekto okazis kaj ebligis elekti tri reprezentantojn, inter kiuj du ĉeestis la unuan kunvenon de la Popola Konstitucianta Asembleo en Ĝenevo fine de decembro 1950, kien iris ankaŭ unu reprezentanto de Nigerio. Tiu unua rezultato naskis en la parlamentoj de Francio, Belgio kaj Nederlando, leĝproponon por organizi similajn balotelektojn, sed tiuj proponoj ne atingis celon. Manke de elekto de alilandaj delegitoj al la Popola Konstitucianta Asembleo, la estro de Tenesio, cedante al premgrupoj, neniigis la leĝon, kiu estis permesinta tiun unuan balotelekton.

Oni atingis haltpunkton.

Nova metodo devis esti prilaborita. Necesis rigardi nulaj ĉiujn pasintajn agojn, kaj studi novan eblan iompost-ioman reprezentadon de la loĝantoj de la planedo, cele al administrado de ĝiaj komunaj aferoj. La nova organizaĵo devas esti starigita iom post iom, per stadioj, kaj kunekzisti, tiom longe kiom necese, apud la malnova. La Kongreso de la Popoloj povas tion fari, sin ŝarĝante ekde nun pri taskoj laŭ sia mezuro. Tial mi konceptis la projekton de Kongreso de l' Popoloj kaj, kun miaj amikoj Jacques Savary kaj Maurice Cosyn, ni prezentis en 1957 la fundamentojn de tiu projekto, t.e. la grada anstataŭigo de la institucioj, kiuj administris la mondon ekde ĝia kreado, per mondskalaj institucioj.

Alfred Rodriguès-Brent.

## CELOJ (artikolo II de la Statuto)

II.1. Starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.

II.2. Proklami la neceson de publikaj Tutmondaj Institucioj kapablaj kontentigi tiujn bezonojn.

II.3. Difini:
   a) sur kiuj terenoj estas necesa la interveno de Tutmonda Institucio;
   b) kiuj transdonoj de kompetenteco profite al la publikaj Tutmondaj Institucioj, devos esti konsentitaj de la Naci-ŝtatoj;
   c) la procedurojn necesajn por la kreado de publikaj Tutmondaj Institucioj;
   d) la strukturon de la kreota Tutmonda Supernacia Federala Aŭtoritato.

II.4. Esprimi per Mondaj Deklaroj la opinion aŭ volon de la tutmonda popolo pri la eventoj koncernantaj la sorton de la homaro.

II.5. Interveni ĉe la registaroj aŭ la internaciaj instancoj pri la aktualaj mondproblemoj.

II.6. Pristudi la raportojn de fakuloj pri la projektoj de Tutmonda Institucio kaj esprimi sian opinion.

II.7. Prezenti antaŭprojekton de Tutmonda Federacia Konstitucio al la naciaj registaroj kaj parlamentoj, kaj al la diversaj internaciaj instancoj.

II.8. Ĉiel iniciati utile al la ekfunkciigo de demokrata Monda Parlamento, konsistanta i.a. el Ĉambro de la Tutmonda Popolo.

II.9. Celi la kunlaboradon kaj la kreadon de edukaj, informaj kaj kulturaj organismoj, favorantaj la ekkonsciigon pri universala solidareco.

## HISTORIO

**En 1953,** RODRIGUES-BRENT ekpensas pri projekto de KONGRESO DE LA POPOLOJ sekve de la fiasko de la Konstitucianta Asembleo de la Popoloj, kiu havis sian unuan, kaj bedaŭrinde lastan, kunvenon en Ĝenevo en decembro 1950.

**En 1957,** kun siaj amikoj Maurice COSYN kaj Jacques SAVARY, RODRIGUES-BRENT prezentas la projekton de KONGRESO DE LA POPOLOJ al la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj.

**La 23-an de majo 1963,** en Bruselo, Maurice COSYN organizas kongreson, el kiu rezultas la Komitato por KONGRESO DE LA POPOLOJ, kies ĝenerala sekretario estas RODRIGUES-BRENT.

**La 3-an de marto 1966** estas lanĉita la ALVOKO DE LA 13 MONDFAMAJ EMINENTULOJ:

*Manke de supernacia leĝo, la Ŝtatoj estas devigataj kalkuli pri sia forto por defendi siajn interesojn. Konsekvence, la milito - intenca aŭ akcidenta - fariĝis ekde la atoma malintegrado kaj de la ampleksigo de la bakteriaj armiloj, la absurda "fina solvo", la genocido vastigita al la tuta homa specio.*

*Manke de mondaj institucioj kapablaj certigi la kontentigon de la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj, la homa persono restas mokvipata. Dum grandegaj riĉaĵoj estas fuŝataj, du trionoj de la homaro suferas pro malsato.*

*La sciencaj kaj teknikaj progresoj tamen ebligas la organizadon de monda komunumo, en kiu regus paco kaj abundo, en kiu la fundamentaj liberoj estus garantiitaj al la individuoj, al la popoloj, al la nacioj.*

*Kial ne estas tiel ? Tial, ĉar la registaroj, hipnotizitaj de sia devo meti en la unuan rangon la necesajn transformadojn, eĉ malhelpas la agadon de la internaciaj institucioj kreitaj por defendi la universalan pacon kaj servi la homon.*

*En tiaj kondiĉoj, la savo povas veni nur el la monda popolo, el la individuoj kiuj formas ĝin, el ĉiu el ni.*

*La unua ago, simpla kaj efika, pri kies plenumo ni invitas ĉiun el vi, estas, ke* ***vi registrigu vin kiel mondcivitanon,*** *kiel ni mem jam faris.*

*La dua paŝo, kiun ni faros kune, se sufiĉe multaj respondos al nia alvoko, estos organizi sur transnacia bazo la elektadon de delegitoj komisiitaj por defendi la intereson de la homo, por esprimi la depostulojn de la monda popolo, kaj fine por ellabori la Leĝon de Pacama kaj Civilizita Mondo.*

Subskribis tiun alvokon :

| | | |
|---|---|---|
| Lord BOYD ORR | Josué de CASTRO | Danilo DOLCI |
| Shinzo HAMAI | J.L. HROMADKA | Alfred KASTLER |
| Rajan NEHRU | Linus PAULING | Abbé PIERRE |
| Jean ROSTAND | Bertrand RUSSELL | Ivan SUPEK |
| | Hans THIRRING | |

**La 15-an de novembro 1968,** mitingo de 3000 personoj en Parizo kun membroj de la alvoko de la 13.

**La 7-an de julio 1977**, efektive ekfunkcias la Kongreso de la Popoloj. Dum la kongreso de Parizo-Sorbono (1977) estis proklamita la efektiva ekzisto de la Kongreso de la Popoloj. Tiuokaze la 10 elektitaj delegitoj lanĉas dum ĝenerala asembleo la

ALVOKON DE LA 10
(vidu p.41)

De 1969.03.03 ĝis 1977.06.25 estis 5 transnaciaj elektoj, kiuj ebligis la kreadon de la Kongreso de la Popoloj kun jenaj 10 elektitaj delegitoj :

Renée MARCHAND, Enrico DACCO, Rajan NEHRU, Jacques MUHLETHALER, Marc GARCET, Andrée GAYMARD-ROLLET, Lucile GREEN, Max HABICHT, Eizo ITOO, Makoto NAGAOKA.

Tiujn balotojn organizis la Komitato por la Kongreso de la Popoloj, kiu konsistis el :
Atam AGARWAL, Vladimiro BALLARIN, Françoise BLAMOUTIER, Paul BOULET, Jerry BOURGEOIS, Augustine CHAUVIRE, Thérèse COLLET, Shankar DEV, Jean DIEDISHEIM, Basile GINGER, Robert GROMET, Georges GRUDZIELSKI, Philip ISELY, Paul de la PRADELLE, Finn LAURSEN, Roland LEIBUNDGUT, Jos LEMMERS, Robert MADEC, Guy MARCHAND, Everett MILLARD, Pierre MOCH, Ambroise MONOD, Ishi MORITA, Bernard MUET, Mamadou N'DIAYE, Claude PANNETIER, Jean PARADIS, Jean PREDINE, John ROBERTS, Roger RODEYNS, Reinhart RUGE, Ivan SUPEK, Louise TOURNIER, Renée VOLPELIERE, Roger VOLPELIERE, Lucy WEBSTER, Jean-Paul WELLHOFF, Roger WELLHOFF, Alfred WILLIAMS.

## 70 000 VOĈDONINTOJ, EL 110 LANDOJ, JAM PARTOPRENIS LA UNUAJN BALOTOJN

**Mondcivitanoj el :**

Alĝerio, Benino, Burundo, Centrafrika Respubliko, Ĉadio, Eburio, Etiopio, Gabono, Gambilando, Ganao, Gvineo, Kamerunio, Kenjo, Kongolo, Liberio, Libio, Malio, Maroko, Maŭritanio, Niĝero, Niĝerio, Ruando, hispana Saharo, Senegalio, Siera-Leono, Sudano, Tanĝero, Togolando, Tunizio, Ugando, Voltalando, Zairio.

Kanado, Usono.

Argentino, Bahamoj, Bolivio, Brazilo, Ĉilio, Ekvadoro, Gvadelupo, Gvajano, franca Gvajano, Haitio, Honduro, Jamajko, Kolombio, Kostariko, Martiniko, Meksiko, Nikaragvo, Panamo, Peruo, Porto-Riko, Salvadoro, San-Domingo, Urugvajo, Venezuelo.

Andoro, Aŭstrio, Britio, Bulgario, Ĉeĥo-Slovakio, Danio, Finnlando, Germana Demokrata Respubliko, Federacia Respubliko Germanio, Grekio, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Italio, Jugoslavio, Luksemburgo, Monako, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Rumanio, Sovetio, Svedio, Svislando.

Afganistano, Irako, Irano, Israelo, Kuvajto, Libano, Arabio.

Aŭstralio, Birmo, Cejlono, Filipinoj, Hindio, Hongkongo, Japanio, Kamboĝo, Koreio, Laoso, Nov-Gvineo, Nov-Hebridoj, Nov-Kaledonio, Nov-Zelando, Pakistano, Tahitio, Vjet-Namo.

Madagaskaro, Maŭricio, Reunio, Sejŝeloj.

**Loĝantoj de mondanigitaj urboj kaj komunumoj :**

Chassepierre (Belgio), Orval (Cher, Francio), Vallon Pont d'Arc (Ardèche, Francio), Anduze (Gard, Francio),

Mont-sur-Marchienne (Belgio), Puy l'Evêque (Lot, Francio), Rocamadour (Lot, Francio), Ayabe (Japanio), Floressas, Sarrazac, Soturac, Touzac kaj Vire-sur-Lot (Lot, Francio), Tourcoing (Nord, Francio), Arès (Gironde, Francio).

**Membroj de movadoj :**

"Amikoj de la Tero", "Commonwealth de la Mondcivitanoj" "Internacia Civila Servo", "Internacio de Militrifuzantoj", "I.S.M.U.N.", "Kvakeroj", "Lernejo, Ilo de Paco", "Liberpenso", "Mondfederalistoj", "Movado Internacia por la Repacigado", "Oomoto", "Sukuristoj de la Lot-departemento", "Welcome Bienvenue".

**Kaj eminentuloj :**

Jean d'Arcy, Claude Aveline, Patrick Armstrong, Hervé Bazin, Antonin Besson, François Billetdoux, Edouard Bonnefous, Pierre Bour, Boyd Orr, Robert Buron, Rodriguès-Brent, Josué de Castro, Michel Cépède, Guy Chatiliez, René Cruse, André Diligent, J.J. de Félice, Jean Fourastié, Henri Friedel, Georges Friedmann, Euthymène Georgiadès, Jean Grandmougin, Max Habicht, André Haim, Jean Hélion, Guy Héraud, Olivier Hussenot, Roger Ikor, Germain Jousse, Alfred Kastler, Antoine Lacassagne, Giorgio La Pira, Jean Lasserre, Henri Laugier, François Le Lionnais, Roger Lhombreaud, Irène de Lipkowski, Lance Mallalieu, Sicco Mansholt, Pierre Marthelot, Léonide Moguy, Théodore Monod, Rajan Nehru, Emil Niemoller, Linus Pauling, Louis Périllier, Abbé Pierre, Paul de la Pradelle, Louis Quesnel, S-ino Romain-Rolland, Jules Romains, Jean Rostand, Abdus Salam, Julien Teppe, René Thom, Jean Toulat, Henry Usborne, René Bernard-Vieilleville, D-ro Lagroua Weill-Hallé, Setsuo Yamada...

# REZULTOJ DE LA UNUAJ BALOTOJ
# AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ (1969-1984)

## Unua elekto

lanĉita la 3-an de marto 1969

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj en la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj, kaj de la membroj de Commonwealth de la Mondcivitanoj en junio 1969 :
Josué de Castro (mortinta en 1973) kaj Jeanne Haslé (eksiĝinta), anstataŭitaj de Renée Marchand (Francio) kaj Douglas Mattern (Usono). Novaj anstataŭontoj : Henri Cainaud (Francio) kaj John Roberts (Britio).

Procento de la voĉdonintoj : 58,04 %

| | | | |
|---|---|---|---|
| Registritoj : 10 000 | Josué de Castro | 67.67% | 3 848 |
| Voĉdonintoj :5 804 | Jeanne Haslé | 32.39% | 1 842 |
| Nulaj voĉoj : 118 | Renée Marchand | 32.09% | 1 825 |
| Esprimitaj voĉoj : 11 350 (*) | Enrico Dacco | 16.74% | 952 |
| | Rodriguès-Brent | 16.00% | 910 |
| | Douglas Mattern | 12.59% | 716 |
| | Hugh Schonfield | 12.43% | 707 |
| | Onkar Natt | 9.67% | 550 |

(*) Kelkaj voĉdonintoj voĉdonis por nur 1 kandidato.

Josué de Castro (1905-1973), brazila kuracisto, kiu per sia libro "**Geopolitiko de la Malsato**" ekkonigis la nord-sudan problemon, estis la unua elektita delegito al la Kongreso de la Popoloj. Li deklaris : "Necesas krei Mondan Parlamenton, kies reprezentantoj, transnacie elektitaj, sentos sin provizitaj per la potenco kaj aŭtoritato necesaj por dikti la Mondajn Leĝojn kaj montri la vojon sekvendan de UNO."

## Dua elekto

1972

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1969 en la Internacia Registrolibro, de la loĝantoj de 3 mondanigitaj komunumoj (Chassepierre en Belgio, Orval (Cher) kaj Vallon Pont d'Arc (Ardèche) en Francio) kaj de la membroj de la Movado Internacia por la Repacigado, de la Universala Movado por Monda Federacio, de la Internacia Civila Servo, kaj de la Internacio de Militrifuzantoj (Unuiĝo Pacista de Francio) en marto 1972 : S-ino Rajan Nehru (Hindio) kaj Jacques Muhlethaler (Svislando). Anstataŭontoj : Pierre Martin (Francio) kaj Etienne Reclus (Francio).

Procento de la voĉdonintoj : 43.33 %

| | |
|---|---|
| Registritoj : | 12 559 |
| Voĉdonintoj : | 5 442 |
| Nulaj voĉoj : | 156 |
| Esprimitaj voĉoj : | 10 572 |

| | | |
|---|---|---|
| Rajan Nehru | 39.27% | 2 076 |
| Jacques Muhlethaler | 37.26% | 1 970 |
| Pierre Martin | 34.99% | 1 850 |
| Etienne Reclus | 31.53% | 1 667 |
| Henri Cainaud | 21.28% | 1 125 |
| John Roberts | 15.87% | 839 |
| Georges Grudzielski | 11.50% | 608 |
| Vladimiro Ballarin | 8.26% | 437 |

## Tria elekto

1973

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1972 en la Internacia Registrolibro, de la membroj de la Monda Asocio por Lernejo Ilo de paco, de la Internacio de la Militrifuzantoj, de la Universala Movado por Monda Federacio, de la Internacia Civila Servo kaj de la loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj Mont s/ Marchienne en Belgio kaj Anduze (Gard) en Francio, en decembro 1973 : S-ino Andrée Gaymard-Rollet (Francio) kaj Marc Garcet (Belgio). Anstataŭontoj : Alfred Hassler (Usono) kaj Michel Cépède (Francio).

Procento de la voĉdonintoj : 46.99 %

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Registritoj : | 4 620 (*) | Marc Garcet | 35.89% | 766 |
| Voĉdonintoj : | 2 171 | Andrée Gaymard-Rollet | 32.89% | 702 |
| | | Alfred Hassler | 31.02% | 662 |
| Nulaj voĉoj : | 37 | Michel Cépède | 29.94% | 639 |
| Esprimitaj voĉoj : | 4 043 | Mamadou N'Diaye | 22.02% | 470 |
| | | Roland Leibundgut | 17.57% | 375 |
| | | Lucy Webster | 10.26% | 219 |
| | | Alfred Williams | 9.84% | 210 |

(*) En Mont s/ Marchienne voĉdonis nur 281 loĝantoj, en Anduze 75. Pro tiu malforta procento da voĉdonintoj, la voĉdonintoj de Mont s/ Marchienne kaj Anduze estis konsiderataj kiel individuaj voĉdonintoj.

## Kvara elekto

1975

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1974 en la Internacia Registrolibro, de la membroj de "Amikoj de la Tero", de "Kvakeroj", de la Universala Movado por Monda Federacio, de la Sukuristoj de la Lot-departemento (Francio), de la Internacia Civila Servo, de la Unuiĝo Pacista de Francio kaj de la loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj Rocamadour kaj Puy l'Evêque (Lot) en Francio, en novembro 1975 : Lucile Green (Usono) kaj Max Habicht (Svislando). Anstataŭontoj : Hanna Newcombe (Kanado) kaj Devi Prasad (Hindio).

Procento de la voĉdonintoj : 33.57 %

| | |
|---|---|
| Registritoj : | 10 047 |
| Voĉdonintoj : | 3 371 |
| Nulaj voĉoj : | 459 |
| Esprimitaj voĉoj : | 5 751 |

| | | |
|---|---|---|
| Lucile Green | 40.41% | 1 177 |
| Max Habicht | 39.42% | 1 148 |
| Hanna Newcombe | 36.46% | 1 062 |
| Devi Prasad | 26.75% | 779 |
| Philip Isely | 16.14% | 470 |
| Finn Laursen | 15.10% | 440 |
| Atam Agarwal | 11.95% | 348 |
| Morita Ishi | 11.22% | 327 |

## Kvina elekto

1977

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1976 en la Internacia Registrolibro, de la membroj de Lernejo Ilo de Paco, de la Universala Movado por Monda Federacio, I.S.M.U.N. (International Students Movement for United Nations), Oomoto (Japanio), Kvakeroj (Kenjo), Liberpenso, Internacia Civila Servo, Unuiĝo Pacista, kaj de la loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj Ajabe (Japanio) kaj Sarrazac, Vir s/Lot, Mauroux, Tauzac, Soturac en Lot-departemento, en Francio, en junio 1977 : Eizo Itoo (Japanio) kaj Makota Nagaoka (Japanio). Anstataŭontoj : Paul de la Pradelle (Francio) kaj Ivan Supek (Jugoslavio).

Procento de la voĉdonintoj : 49.67 %

| | |
|---|---|
| Registritoj : | 10 047 |
| Voĉdonintoj : | 4 991 |
| Nulaj voĉoj : | 81 |
| Esprimitaj voĉoj: | 9 618 |

| | | |
|---|---|---|
| Eizo Itoo | 47.43% | 2 329 |
| Makota Nagaoka | 46.21% | 2 269 |
| Paul de la Pradelle | 24.82% | 1 219 |
| Ivan Supek | 24.37% | 1 197 |
| Reinhart Ruge | 20.87% | 1 025 |
| Jos Lemmers | 13.36% | 656 |
| Robert Gromet | 12.19% | 597 |
| Shankar Dev | 6.63% | 326 |

## Sesa elekto

1980

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1977 en la Internacia Registrolibro, de la membroj de Lernejo Ilo de Paco, de la Universala Movado por Monda Federacio, Oomoto (Japanio), Internacia Civila Servo, Unuiĝo Pacista, kaj de la loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj Ajabe (Japanio), Dundas kaj Mississauga (Kanado), Arès kaj Tourcoing (Francio) en 1980 : Helen Tucker (Kanado) kaj Bhupedra Kishore (Hindio). Anstataŭontoj : Safi Faye (Senegalio) kaj Sigrid Hannisdahl (Norvegio).

Procento de la voĉdonintoj : 35.57 %

| | | | |
|---|---|---|---|
| Registritoj : | 10 129 | Helen Tucker | 1 520 |
| Voĉdonintoj : | 3 603 | Bhupendra Kishore | 972 |
| Nulaj voĉoj : | 17 | Safi Faye | 901 |
| Esprimitaj voĉoj : | 6 985 (*) | Sigrid Hannisdahl | 860 |
| | | Ambalal Patel | 827 |
| | | José-Maria Casas-Huguet | 693 |
| | | Gabriela Battaini | 668 |
| | | Rolf Haegler | 544 |

(*) Kelkaj voĉdonantoj voĉdonas por nur 1 kandidato.

## Sepa elekto

1984

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1980 en la Internacia Registrolibro de la membroj de Lernejo Ilo de Paco, de la Universala Movado por Monda Federacio, de Oomoto (Japanio), de la Internacia Civila Servo, de Unuiĝo Pacista de Francio kaj de la loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj Ajabe (Japanio), Tourcoing (Francio) en julio 1984 : Tsuruji Kotani (Japanio) kaj Muriel Saragoussi (Brazilo). Anstataŭontoj : M.K. Banerji (Hindio) kaj Lucien Harmegnies (Belgio).

Procento de la voĉdonintoj : 39.27 %

| | | | |
|---|---|---|---|
| Registritoj : 8 000 | Tsuruji Kotani | 45.10% | 1 420 |
| Voĉdonintoj : 3 142 | Muriel Saragoussi | 38.57% | 1 212 |
| Nulaj voĉoj : 82 | M.K. Banerji | 21.70% | 682 |
| Esprimitaj voĉoj : 5 535 (*) | Lucien Harmegnies | 17.72% | 557 |
| | Boubacar Kane | 14.67% | 461 |
| (*) Kelkaj voĉdonintoj voĉdonis por nur 1 kandidato. | René Wadlow | 14.06% | 442 |
| | Mohamed Bensalem | 13.52% | 425 |
| | Ross Smyth | 10.69% | 336 |

## Oka elekto

1987

Estis elektitaj :

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1984 sur la Internacia Registrolibro (loĝantaj en 50 landoj), de membroj de Unuiĝo Pacista de Francio, de Pax Christi, de la Liberpenso, de la Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libero, de diversaj belgaj Asocioj (Charleroi), de Mondaj Federalistoj de Japanio, de loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj de Japanio (aparte Hiroŝimo), de Kanado, de Tourcoing (Francio, de la personoj memvole enskribiĝintaj sur la balotlistoj : Hideaki Kuwabara (Japanio) kaj Hazel MacCallion (Kanado). Anstataŭontoj : Josiane Ah-Sim-Troumps (Maŭricio) kaj Prachoomsuk Achava-Amrung (Tajlando).

Procento de la voĉdonintoj : 40.63 %

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Registritoj : 8 410 | Hideaki Kuwabara | 38.58% | 1 313 |
| Voĉdonintoj : 3 417 | Hazel MacCallion | 30.23% | 1 029 |
| | Josiane Ah Sim | 24.86% | 846 |
| Nulaj voĉoj : 26 | Prachoomsuk Achava- | 21.77% | 741 |
| Esprimitaj voĉoj : 6 522 (*) | Bamba Fall | 21.21% | 722 |
| | Ch.Raymond Goor | 20.07% | 683 |
| (*) Kelkaj voĉdonas | Keith Suter | 17.77% | 605 |
| por nur 1 kandidato. | D.Marian Mushkat | 17.13% | 583 |

## Naŭa elekto

1994

Estis elektitaj:

de la Mondcivitanoj enskribitaj ekde 1987 sur la Internacia Registrolibro (loĝantaj en 77 landoj), de membroj de "Liberpenso", de loĝantoj de mondanigitaj urboj Tourcoing (Nord-departemento, Francio), Aubais (Gard-departemento, Francio), Djilacoune (Casamance, Senegalio), kaj de membroj enskribitaj sur la balotlistoj.

Procento de la voĉdonintoj: 38,08 %

| | |
|---|---|
| Registritoj: | 7 589 |
| Voĉdonintoj: | 2 890 |
| Nulaj voĉoj: | 49 |
| Esprimitaj voĉoj: | 5 648 (*) |

* Kelkaj voĉdonis por nur 1 kandidato.

| | | |
|---|---|---|
| Landing Niassy | 46,46% | 1 320 |
| Malick M'Baye | 39,70% | 1 128 |
| Georges Krassovsky | 24,53% | 697 |
| Jean Henaire | 22,87% | 650 |
| Martha Andreasson | 21,78% | 619 |
| Charles Mercieca | 20,09% | 571 |
| Ruth Gunnarsen | 15,98% | 454 |
| Giogio Silfer | 7,35% | 209 |

## DEKLARO DE JOSUE DE CASTRO

Post la teknologia revolucio, kiu okazis laŭlonge de nia jarcento, ĉio aliiĝis sur nia planedo. Estis vera mutacio de la homa etoso, ĉar ĉie novaj trajtoj enmetiĝis en la vivon de la homoj.

Post tiu materia revolucio, aperis multnombraj problemoj, kiuj povas trovi solvon nur mondskale, ĉar, vere, ni travivas hodiaŭ planedan epokon.

La plej gravaj problemoj, kiujn la homaro devas fronti dum la lasta parto de la dudeka jarcento, kiaj : problemo de la atommilito, problemo de la ribeloj kaj perfortoj en la mondo, problemoj de malsato kaj de nesufiĉa elvolviĝado, povos esti solvataj nur per tutmonda solidareco kaj partopreno de ĉiuj popoloj, ĉar tiuj problemoj koncernas ĉiujn homojn, sendepende de iliaj ideologioj, rasoj, filozofioj pri vivo.

Tio kondukas nin al la konkludo, ke se la homaro volas postvivi la katastrofojn, kiuj ĝin minacas, ĝi devas maksimume disvolvi sian senton de nova tutmonda civitaneco. Oni ne povas senti sin indiferenta fronte al la komunumo de mondcivitanoj, ĉar ni ĉiuj sur nia planedo estas skuegataj de senantaŭaj transformoj en la historio de la homaro.

La gravaj solvoj estos trovitaj nur laŭ tutmonda skalo, je la lumo de nova politika konscienco, kiu estu fondita ne sur perforto, sed sur la rajto de la popoloj.

Tiu rajto je mondskalo, uzita la unuan fojon en la historio de l' homaro, ebligis al la unua grupo de 10 000 mondcivitanoj de nia planedo, loĝanta en 87 landoj, elekti, perletere, de la 3-a de marto ĝis la 7-a de junio 1969, la du unuajn delegitojn al la estonta Kongreso de la Popoloj. Min trafis la honoro esti elektita per tiu voĉdono kune kun Jeanne Haslé, direktorino de la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj.

Mi volas substreki la gravecon de tiu unua apero de homa solidareco mondskala : nuntempe ekzistas tri specoj de problemoj, kiujn oni devas solvi por evitigi al la mondo la plej malbonajn katastrofojn. Oni povas ilin resumi per tri vortoj : malarmado, kreskado, malkoloniigado. Nu, miaopinie, kion utilan oni faras laŭ tri direktoj, tio estas tute ne sufiĉa, tute sen rilato kun la rezultatoj, kiujn oni devas atingi ĝis urĝa dato. De kio, tio dependas ? Unue, de la sensenca divido de la mondo en naciŝtatoj, kiuj pretendas sin tute suverenaj dum la kunvenoj aŭ en la organizaĵoj internaciaj, kie la estraraj delegitoj defendas kontraŭajn egoismajn profitojn, neniam enkalkulante la lokon redonendan al la komunaj necesaĵoj de ĉiuj homoj : sekureco, nutrado, edukado. Do oni donu la parolrajton al la popolo de l' mondo. Pli malfrue, post multaj manifestadoj similaj al tiu unua transnacia voĉdono, la Kongreso de l' Popoloj konsistanta el delegitoj elektitaj de kreskanta nombro da civitanoj, rajtos plilaŭtigi la voĉon nome de la popolo de l' mondo por postuli la plenumon de la fundamentaj necesaĵoj de ĉiuj kaj la starigon de mondaj institucioj, eĉ de la Monda Federala Institucio : la Monda Estraro.

La nunaj gravegaj problemoj ne nur ne povas esti solvitaj, sed ilia graveco kreskas tagon post tago. Oni devas alarmi. La homaro, minacata per malsato, sangaj ribeloj, risko de atommilito, devas konkursi kontraŭ la morto kaj venki. Mi alvokas ĉiujn homojn, por ke ili apogu nin, Jeanne Haslé kaj mi mem kaj ke ili kontribuu al ellaborado de nova monda ordo, kies unuan stadion ni ĵus travivis.

# *MONDAJ DEKLAROJ*

De la 5-a de junio 1972 ĝis la 23-a de novembro 1982, la Kongreso de la Popoloj lanĉis 20 Mondajn Deklarojn pri diversaj faktoj koncerne la komunajn bezonojn de la homaro.

Monda Deklaro n-ro 1

En Parizo, la 17-an de junio 1972
Kunveno en Stokholmo

## VIVMEDIO

Kiel unuaj rekte kaj demokrate elektitaj delegitoj, fare de transnacia elektantaro dispartigita en 110 landoj,

NI ASERTAS

havi zorgojn pro la danĝeroj, kiuj trafos la homan specion pro :

- la poluado de la aero kaj riveroj, kiu ignoras la landlimojn,
- la poluado de la oceanoj, kiuj iĝis monda rubaĵejo,
- la senpripensa detruado de plugeblaj grundoj,
- la abomeninda malŝparado de la nerenovigeblaj naturaj riĉofontoj.

Konsciante, ke tiuj problemoj nun ne solveblas pro manko de monda solidareco, kiu devigus ĉiujn entreprenojn lukti kontraŭ tiuj plagoj,

NI PETAS

la Delegitojn de la Suverenaj Naci-Ŝtatoj kunsidantajn en Stokholmo ekkonscii pri la katenanta neebleco efike penadi por la sola solvo, kiu certigos la homan pluvivon, nome :

- la kreado de Mondaj Institucioj fonditaj sur parta transdono de povo fare de la naci-ŝtatoj, ĉar la vivmedion ŝirmos nur tutmonda leĝo.

Monda Deklaro n-ro 2

En Parizo, la 17-an de novembro 1972
Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj

## UNUIĜINTAJ NACIOJ

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS

ke, ekde sia fondiĝo, la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj montriĝis nekapabla :

- solvi la plejmulton de la perarmilaj konfliktoj,
- gardi la rajtojn de la rasaj malplimultoj,
- certigi la disvolvadon planedskale,
- organizi mondan politikon de mediprotektado,
- starigi justan kaj stabilan monsistemon.

NI DEKLARAS

ke tiujn gravajn problemojn, kiuj komune interesas ĉiujn homojn, ne povas solvi la reprezentantoj de la naci-ŝtatoj kun apartaj, tro ofte malsamaj, interesoj,
kaj ke nur delegitoj komisiitaj de la popoloj povos ekfunkciigi mondan politikon.

NI PETAS

la abolicion de la reĝimo de absolutaj naciismoj

POR CERTIGI LA PLUVIVON DE LA HOMARO, LA NACI-ŜTATOJ DEVAS KONSENTI, KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ, PARTAJN DELEGADOJN DE SIAJ KOMPETENTOJ AL VERAJ MONDAJ INSTITUCIOJ KUN POVOJ LIMIGITAJ, SED REALAJ.

Monda Deklaro n-ro 3

subskribita de Josué de CASTRO, unua elektita delegito al la Kongreso de la Popoloj la 21-an de septembro, kaj diskonigita en la tago de lia morto, la 24-an de septembro 1973.

En Parizo, la 24-an de septembro 1973
Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj
Marjuro

## MONDA OCEANO

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS, ke la monda oceano

- estas la vivnecesa medio por la stabileco de la klimatoj, ankaŭ por la akva ciklo sur la planedo ;
- entenas egan, sed elĉerpeblan kvanton da riĉaĵoj por nutrado, energifontoj, industriaj krudaj materialoj.

NI KONSTATAS,

ke la monda oceano, estante sen propra jura statuto, suferas avidon ofte senbridan de la naci-ŝtatoj. Ega estas la risko vidi tiujn ĉi dispartigi marojn kaj oceanojn je sia profito. Ega estas la risko de kreskanta poluado ĝis detruo de la oceana riĉeco.

NI DEKLARAS, ke la monda oceano

- estas propraĵo komuna por ĉiuj planedanoj ;
- estu protektata kontraŭ senbrida avido.

NI PETAS

la kreadon de Monda Institucio specialigita, kun limigitaj sed realaj povoj, kapabla devigi la naci-ŝtatojn respekti regulojn, kiuj nepras por la pluvivo de la monda oceano kaj ties ekspluatado profite al la tuta homaro.

Monda Deklaro n-ro 4

En Rocamadour, la 2-an de junio 1974
(mondanigita komunumo)

## ENERGIO
## kaj
## KRUDMATERIALOJ

Kiel unuaj rekte kaj demokrate elektitaj delegitoj de elektantaro el 110 landoj,

NI MEMORIGAS

ke, de 25 jaroj, la Mondanistoj kulpigas la Nacian Suverenecon kiel la kaŭzon de la ekonomiaj kaj politikaj malordoj.

Hodiaŭ pli ol iam ajn,

NI KONSTATAS

- la persistan ekspluatadon de la Tria mondo fare de la riĉaj landoj ;
- la neegalecon fronte al la aliro al la krudmaterialoj ;
- la malŝparadon de la vivtenaj riĉaĵoj.

Sekve,

NI DEKLARAS

nepra la kreadon de TUTMONDAJ INSTITUCIOJ kun limigitaj sed efektivaj povoj por certigi :

- la racian ekspluatadon de la nerenovigeblaj krudmaterialoj kaj de la ekzistantaj energi-fontoj ;
- la justan dispartigon de la riĉaĵoj al la popoloj de la mondo ;
- la esploradon de novaj energi-fontoj nepoluantaj.

NUR MONDA SOLVO KAPABLAS SOLVI TIUJN PROBLEMOJN, KIUJ KONCERNAS LA TUTMONDAN PLUVIVON

Monda Deklaro n-ro 5

En Mondanista Centro,
Kastelo La Lambertie, aŭgusto 1974
Konferenco de Bukaresto

## MONDA POPOLADO

Kanceliero KOHL ĵus alvokis la germanojn favore al germanara kreskado. Konstante, la ŝtatregantoj deziras plialtigi la popolan kvanton en sia lando. Tamen aliaj, sed malpli multnombraj, pledas por limigi la demografian kreskadon (Ĉinio, Hinda Unio).

La elektitaj delegitoj de la Kongreso de la Popoloj dissendis, en 1974, okaze de la Bukaresta Konferenco pri la Monda Popolado, la ĉiam valoran Mondan Deklaron jenan :

NI KONSTATAS,

ke, dum okazas la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Monda Popolado, centoj da miloj da planedaj loĝantoj estas mortantaj pro malsato.
Plejparto de la registaraj reprezentantoj, ne pensante, ke neregata homkvanta kreskado nun minacas la homan specion, argumentas la nocion pri nacia suvereneco en tiu problemo.
La naci-ŝtatoj konsideras sian demografian kreskadon, kiel superriĉaĵon, kiu investas en politikan kaj militan povon.
Naci-ŝtato akceptas praktiki naskolimigadon, nur kiam ĝia propra prospero estas minacata.

KONKLUDE,

ni asertas, ke la konkurado de la naci-ŝtatoj pri demografio kondukas nur al kreskado de la absoluta nombro de la malfavoratoj sur la Tero.

KONSEKVENCE, ni deklaras, ke solvo estas nur per :

- la malkreskado de la superkonsumado fare de la monhavaj landoj ;
- la plialtigo de la vivnivelo en la malriĉaj landoj ;
- pli bona monda divido de la riĉaĵoj ;
- kreado de Monda Institucio justa kaj efika, kiu sola kapablos ekvilibrigi la demografian kreskadon, proponante rimedojn je la servo de la tuta homaro, ne nur por kelkaj homgrupoj, regantaj sociaj klasoj, ekonomiaj oligarkioj.

Monda Deklaro n-ro 6

En Parizo, novembro 1974
Roma Konferenco

## NUTRADO

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI REMEMORIGAS,

ke de 25 jaroj la Mondanistoj denuncas la naciajn suverenecojn kiel la kialon de ekonomiaj kaj politikaj malordoj, el kiuj la krizo de la nutrado estas sendube la plej skandala.

NI KONSTATAS,

la pludaŭradon de subnutrado aŭ misnutrado de la plejmulto de la homoj ;

la malŝparadon de la naturaj riĉaĵoj per elĉerpado kaj poluado, aparte, de la fekundeco de la tero kaj de la riĉaĵoj de la maro.

NI DENUNCAS

la politikon de la registaroj de la naci-ŝtatoj, pli emaj limigi la oferton al la merkatoj, ol kontentigi la plej urĝajn bezonojn de ĉiuj.

NI ASERTAS,

ke nur novaj ekonomiaj strukturoj certigantaj la kontentigadon de la unuarangaj bezonoj kaj, plej urĝe, de tiuj de la plej malriĉaj, povas ebligi la pluvivon de la specio sur nia kosma ŝipo : la Tero ;

ke, de kiam John Boyd Orr, Mondcivitano, Nobelpremiito pri Paco, unua ĝenerala direktoro de U.N.O. por Nutrado kaj Agrikulturo (F.A.O), starigis la unuan pro-

jekton de lukto kontraŭ la nutraĵmanko (1946), la registaroj de la naci-ŝtatoj kulpis pri la forĵeto de ĉiuj proponoj mondskale organizi la nutradon, kaj ke tiel ili sin malindigis starigi la MONDAJN INSTITUCIOJN nepre necesajn por tiuj novaj ekonomiaj strukturoj.

NI ALVOKAS

al ĉiuj mondcivitanoj, al ĉiuj homservaj organizaĵoj, por ke ili ekprenu per siaj propraj manoj sian destinon, kaj trudu

LA MONDAN SOLVON,
KIUN POSTULAS LA MONDA PROBLEMO
DE HOMAR-NUTRADO.

Monda Deklaro n-ro 7

En Parizo, januaro 1975

## MALARMADO

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS,

ke la naci-ŝtatoj, pli ol 150, nuntempe defendas 250 000 kilometrojn da ŝtatlimoj ;

ke ili malŝparas, por tiu "reciproka defendo", nerekre-eblajn riĉaĵojn ;

ke la 100 milionoj da homoj nun laborantaj sur nia planedo por armado, perfekte povus esti dungataj por krei ekipilojn utilajn al la monda komunumo, kaj aparte tiujn, kiuj ebligus la disvolvadon de la Tria Mondo ;

ke la registaroj de la naci-ŝtatoj, por akceptigi de la popoloj sian politikon pri armado, ne hezitas ludi per la plej primitivaj refleksoj de siaj ŝtatanoj.

NI MEMORIGAS,

ke la feŭdaj militoj ĉesis nur, kiam la agnosko al supera aŭtoritato povis limigi la lokajn suverenecojn. La sama procedo devas aplikiĝi mondskale.

NI DEKLARAS,

ke malarmado efikos nur, se ĝi estos kontrolata de organismo kun povoj limigitaj, sed realaj, kio supozigas la starigadon de MONDA INSTITUCIO.

SEN LIMIGO DE LA NACIA SUVERENECO,
ĈIU PROPONO MALARMI
ESTAS NUR TROMP-LOGILO !

Monda Deklaro n-ro 8

En Parizo, marto 1978
Jaro de la Virinoj

## VIRINAJ RAJTOJ

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS, ke

- malpli ol unu el cent virinoj kapablas efektive partopreni la politikan vivon de sia lando, kvankam ili sumas 51 % el la monda popolo ;
- en ĉiuj medioj socia, politika, jura, morala, la virinoj ĉie estas viktimoj de diskriminacioj, kiel ajn estas ilia socia statuso ;
- la plej ekspluatata viro povas trovi ekspluatotan estaĵon : la virinon ;
- la internacia ordo, ĝis nun establita de la viroj, sin apogas sur la regado kaj leĝo de forto kaj perforto
- la plimulto el la virinoj plu tenataj en sia kondiĉo per la ricevita edukado, tro ofte mem fariĝas objektivaj aliancaninoj de siaj ekspluatantoj.

NI DEKLARAS

unuaranga, EN ĈIUJ MONDAJ LANDOJ, rekonsideron al la virina statuso, por ke ĝi donu al ŝi aliron al aŭtonomeco kaj materia kaj morala sendependeco.

NI ASERTAS, ke

nur tiupreze naskiĝos monda ordo pli justa kaj senpartia.

Monda Deklaro n-ro 9

En Parizo, la 10-an de decembro 1976
28-a datreveno de la
Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj

## HOMAJ RAJTOJ

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate elektitaj al la Kongreso de la Popoloj fare de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS

- ke la esprimado de politikaj opinioj nekonformaj al tiuj de la establita plimulto estas pli kaj pli ofte taksata kiel politika delikto en kreskanta nombro da landoj ;
- ke la libero pri opinio, pri konscienco, same kiel ĉiuj liberoj agnoskitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, estas nun pli kaj pli limigitaj ;
- ke la rajtoj de malplimultoj al politika identeco kaj civitana kaj jura egaleco tro ofte estas ofendmokataj;
- ke la rajtoj de la popoloj al memregado estas breĉe batataj de potencaj ekonomiaj, financaj, politikaj interesoj, same en la riĉaj, kiel en la malriĉaj landoj.

NI SENREZERVE KONDAMNAS :

- ĉiujn formojn de perforto kaj torturo ;
- ĉiujn formojn de rasa segregacio;
- ĉiujn formojn de persekutado aŭ maltoleremo kultura, filozofia aŭ religia;
- ĉiujn formojn de genocido aŭ subpremado de iu homgrupo al alia;
- ĉiujn centralizismojn premajn al regionismo;
- ĉiujn formojn de familia aŭ ekonomia sklaveco;

- ĉiujn formojn de politika aŭ financa imperiismo.

Ni, elektitaj delegitoj, asertas, ke

NUR MONDA INSTITUCIO DEMOKRATE ELEKTITA,
KUN LIMIGITAJ SED EFEKTIVAJ POVOJ,
KAPABLOS CERTIGI AL ĈIU:

- la garantion de la bazaj rajtoj entenataj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj;
- la liberon de konscienco kaj opinio;
- la ekziston de Institucioj certigantaj la personan kaj kolektivan disvolviĝon de ĉiuj homoj;
- la juran respekton al la malplimultoj kaj al ilia propra originaleco;
- la konservadon de la kulturaj kaj heredaj riĉaĵoj de la popolo;
- ĉies rajton je nutrado, sano, edukado, kulturo kaj informado;
- la politikan rajton de la popoloj al demokrata partopreno en monda administrado je ĉiuj niveloj, pere de ekonomikaj, financaj kaj politikaj memdecidoj.

SEN LA EBLECO INDIVIDUE AŬ KOLEKTIVE
APELACII AL SUPERNACIA INSTANCO,
LA FUNDAMENTAJ HOMRAJTOJ
NE ESTOS CERTIGITAJ.

Monda Deklaro n-ro 10

## ALVOKO DE LA DEK

La alvoko de la 13 mondfamaj mondcivitanoj lanĉita la 3-an de marto 1966 estas aŭdita. Voĉdonantaro el pli ol 50 000 personoj, dise vivantaj en cento da landoj kaj konsistanta el mondanistoj kaj el membroj de humanismaj movadoj aŭ geografiaj komunumoj, nin rekte kaj demokrate elektis, per kvin transnaciaj balotoj, la unuaj en la historio de la homaro.

La KONGRESO DE LA POPOLOJ estas antaŭbildo de Tutmonda Asembleo reprezenta, kapabla starigi mondajn instituciojn.

Ĝi estas tribuno super la naciaj interesoj, por aŭdigi la voĉojn de ĉiuj, kiuj esprimas la **postulojn** de la popoloj de la mondo, por ke plu daŭru la homa aventuro, kun respekto al la naturo, cele al elvolviĝo de la individuo.

Jam de nun, la registaroj devas kalkuli kun tiu reprezento de la monda volo, kiu klare sin ekesprimas.

### KIEL DELEGITOJ ELEKTITAJ AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ:

NI PETAS de ĉiuj, kiuj, kiel ni, denuncas la ekonomiajn, politikajn, religiajn, rasajn aŭ naciajn subpremadojn, ke ili alportu al ni sian aktivan subtenon;

NI PETAS de la respondeculoj de la amaskomunikiloj, kaj de la edukistoj, kiuj ekkonsciis pri la urĝeco de la problemoj koncernantaj la pluvivon de la homaro, ilian plej vastan subtenon;

NI PETAS de ĉiu membro de la monda komunumo aktivi por kunigi kiel eble plej rapide Konstituciantan Asembleon de la Popoloj;

NI PETAS de la regantoj de la naci-ŝtatoj, ke ili akceptu **partan transdonon de suvereneco** de siaj popoloj profite al mondaj institucioj, aparte sur jenaj terenoj : pacgardado, lukto kontraŭ la malsato, protektado de la biosfero, respekto al la homaj rajtoj, demografia ekvilibro, ekonomia kaj mona organizado de la planedo.

MANKE DE TIA TRANSDONO, ILI RESPONDECUS PRI VENONTAJ MONDAJ KATASTROFOJ

Elektitaj delegitoj

Enrico DACCO
Marc GARCET
Andrée GAYMARD-ROLLET
Lucile GREEN
Max HABICHT
Eizo ITOO
Renée MARCHAND
Jacques MUHLETHALER
Makota NAGAOKA
Rajan NEHRU

Anstataŭaj delegitoj

Henri CAINAUD
Michel CEPEDE
Alfred HASSLER
Paul de LA PRADELLE
Pierre MARTIN
Douglas MATTERN
Hanna NEWCOMBE
Devi PRASAD
Etienne RECLUS
Ivan SUPEK

Monda Deklaro n-ro 11

En Mondanista Centro
Kastelo La Lambertie, julio 1978

## MALARMADO KAJ UNUIĜINTAJ NACIOJ

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS

mankon en la fina dokumento de la speciala kunsido de la Unuiĝintaj Nacioj pri malarmado, en junio 1978. Efektive, la naci-ŝtatoj tiam ne montriĝis pretaj krei supernacian organismon kapablan limigi la prerogativojn de la nacia suvereneco, kio estus la nura rimedo por atingi realan malarmadon.

NI MEMORIGAS

nian Mondan Deklaron n° 7 de januaro 1975, kiu jam substrekis, ke la feŭdaj militoj ĉesis nur, kiam la agnosko de supera aŭtoritato povis limigi la lokajn suverenecojn. Sama procedo devas aplikiĝi mondskale, t.e. necesas krei supernacian mondan institucion.

NI MEMORIGAS ANKAŬ,

ke nek la Ligo de Nacioj, nek la Unuiĝintaj Nacioj de pli ol 50 jaroj povis efektivigi la deziratan malarmadon kaj garantii la pacon, tial ĉar ili neniam akceptis la limigon de la nacia suvereneco necesan por krei mondan federacian aŭtoritaton.*

NI PETAS do,

ke en ĉiu konferenco pri malarmado estu antaŭvidita KOMISIONO POR STUDI LA EBLON DE TIU LIMIGO DE LA NACIA SUVERENECO.

(*) Vidu la noton sur p.44.

* Por plia informo oni povas referenci la prelegon, kiun faris la prezidanto de la Kongreso de la Popoloj, Max Habicht, dum la unua kunsido de la Instituto por Mondanistaj Studoj, la 10-an de julio 1978 en La Lambertie. (Vidu la dokumenton "**Malarmado kaj Mondfederalismo**")

Monda Deklaro n-ro 12

En Parizo, la 25-an de decembro 1979
Jaro de la Infanoj

## RAJTOJ DE LA INFANO KAJ DE LA ADOLESKANTO

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS,

ke la infanoj kaj la adoleskantoj konsistigas preskaŭ la duonon de la monda loĝantaro, kaj ke ili portas kun si la estontecon de la Homaro;

malgraŭ tio, pri la sorto de la plimulto el ili ne sufiĉe zorgas la generacioj, kiuj ilin naskis.

Efektive,

- plej ofte restis senefiaj la multaj deklaroj de UNO favore al ili;
- la Internacia Labor-Organizo (I.L.O.) konfesas, ke ĝi estas nekapabla abolicii ĉiuloke la infanan laboron;
- la nepre necesaj vivrimedoj ankoraŭ ne estas certigitaj al ĉiuj;
- preskaŭ ĉie la infanoj kaj adoleskantoj plene dependas de la adolta povo kaj de ties sociaj kaj ekonomiaj prerogativoj;
- en iaj landoj, la infanoj kaj adoleskantoj estas senigitaj je libereco, kaj lokitaj en senpersonigaj kaj malhumanigitaj institucioj, pretekste de familieca moralo;
- por iuj el ili la respekto al iaj tradicioj kondukas al ofendo kontraŭ ilia fizika kaj mensa tuteco, kio povas atingi veran kripligadon kaj torturojn.

NI DENUNCAS

- la instigon, fare de iuj naci-ŝtatoj, al supermezura popolkreskado, cele al ekonomia, genta aŭ ideologia hegemonio;
- la konservadon de la malalta nivelo pri alfabetizado, edukado kaj instruado en la Tria kaj Kvara Mondoj, kiu bremsas la emancipiĝon de la junaj generacioj;
- la devigan militistan varbadon al la gejunularo, en la plejparto de la naci-ŝtatoj;
- la vendadon de infanoj kaj adoleskantoj.

NI ASERTAS, ke

- ĉiu infano aŭ adoleskanto estas homo kun plena rajto, kia ajn estas ĝia raso kaj socia aŭ ekonomia klaso;
- ĝi posedas sian propran personecon kaj ankaŭ specifajn bezonojn por sia kreskado;
- ĉiu infano aŭ adoleskanto havas rajton postuli amon, informadon, konscienc-, pens- kaj esprim-liberon, sekve, la rajton partopreni la decidojn, kiuj koncernas la familian kaj socian vivon;
- ĉiu adoleskanta laborulo rajtas pri salajro, pri kiu ĝi libere disponu, kaj rajtas profiti de la samaj garantioj pri socia asekuro kiel la adoltoj.

Sekve, NI PETAS,

la kreadon de

MONDA FEDERACIA INSTITUCIO SUPERNACIA
kun limigitaj, sed realaj povoj, por efektivigi la
RAJTOJN DE LA INFANO KAJ DE LA ADOLESKANTO

Monda Deklaro n-ro 13

En Parizo, la 1-an de decembro 1979

## PLURNACIAJ SOCIETOJ

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate elektitaj al la Kongreso de la Popoloj fare de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS,

ke multaj privataj firmaoj, kun gigantaj dimensioj, t.n. "plurnaciaj aŭ transnaciaj societoj", de pluraj jaroj disvolvas tra la mondo, kaj ĉefe en la Tria Mondo, konstantan aktivadon de penetrado kaj interveno en la socian, ekonomian kaj politikan vivon de naci-ŝtatoj rekonitaj kiel suverenecaj. Tio ebligas al la ekonomia povo superregi la demokratan politikan vivon.

Eĉ agnoskante, ke disvolvado plibonigas la vivkondiĉojn kaj kelkfoje la kvaliton de la vivo por kreskanta kvanto da konsumantoj,

NI BEDAŬRAS

la gravajn konsekvencojn de troa ekspansio de aktivadoj orientitaj ĉefe al profito :

- unuflanke, la ĝenon en la streboj de la Registaraj Organizoj, universalaj aŭ regionaj, por korekti la kreskantan malordon de la monda komerco. Tiun ĝenon okazigas:
  - la kreado de egoisma kaj limigita reto de profitfilioj dislokitaj en la mondo sub la streĉa aŭtoritato de ĉef-societo;
  - la disrabado de la Tria Mondo kaj la malŝparado de la ne-renovigeblaj krudmaterialoj.
- aliflanke, la damaĝon kaŭzitan al la individuaj rajtoj per:

. la ekspluatado de la neegaleco en la laborkondiĉoj en la diversaj landoj kaj tromultkaze la ne-aplikado, fare de tiuj societoj, de la internaciaj konvencioj pri la laboro,

. la krizaj situacioj kaj la malekvilibro rezultantaj en la labora medio.

NI DENUNCAS

- unuparte, pri tiuj agmanieroj la indiferentecon de la publika opinio, tamen informita per diskonigo de multaj skandaloj pri korupto kaj

- aliparte, la ne-sufiĉan kontroladon al tiuj societoj.

NI DEKLARAS,

ke NUR LA KREADO DE SUPERNACIA MONDA INSTITUCIO, KUN POVOJ LIMIGITAJ SED REALAJ, EBLIGOS EFEKTIVE KONTROLI LA PLURNACIAJN SOCIETOJN.

Monda Deklaro n-ro 14

1980

## RIFUĜINTOJ

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate elektitaj al la Kongreso de la Popoloj fare de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS :

En ĉiuj organizitaj kolektivoj ekzistas homgrupoj apartigitaj disde la politika potenco pro politikaj, ideologiaj, etnaj aŭ rasaj motivoj;

- ke iom post iom tiujn homgrupojn oni formetas marĝene de la civitaneco;
- ke la naciŝtataj strukturoj, krom sociologiaj normoj, supermetas leĝajn trudojn, kiuj donas al la instancoj povon ekskludi la homgrupojn rigardatajn kiel danĝeraj;
- ke, sur la kampo de la internacia praktiko, la efiko de tiu ekskluda povo kelkfoje estas kompensita per la leĝo por la azilrajtoj;
- ke la rifuĝinto do estas la logika produkto de la nerespekto al la Homaj Rajtoj fare de la naci-ŝtato.

### NUNTEMPE ESTAS PROKSIMUME 10 MILIONOJ DA RIFUĜINTOJ

Tiu situacio ne nur estas kaŭzo de netolereblaj suferoj sed de ĝi devenas streĉitecoj naskontaj militojn.

NI ANKORAŬ KONSTATAS,

- ke malgraŭ la ekzisto de internaciaj konvencioj pri la rifuĝintoj, U.N.O., agnoskante la absolutecon de la nacia suvereneco, pludaŭrigas tiun procezon. Tiel UNO fakte ebligas la faktan ekskludon, kiu pelas la rifuĝintaron al sengarantia situacio de ekzilitoj.

Konsekvence, NI DEKLARAS,

- ke la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj havas la povon nek por rebonigi tiun okazaĵon, nek por certigi la aplikadon de la Homaj Rajtoj, pro la troa alvoko al la artikolo 2, paragrafo 7, de la Ĉarto de UNO. (Tiu artikolo malpermesas ĉian intervenon "en aferojn, kiuj funde apartenas al la jurisdikcio de kiu ajn ŝtato").

Ni firme ASERTAS

- la rajton al la kunekzistado de ĉiuj homgrupoj en la fundamenta reciprokeco de la Homaj Rajtoj.

NI PETAS,

- ke, en atendo de entuta politika solvo, la sennaciuloj, la ekzilitoj, la rifuĝintoj estu provizataj per individua monda dokumento, kiu certigos al ili senprokrastan protekton, kaj ebligos, ke ili templime atingu la samajn rajtojn kiel la nacianoj de la akceptanta ŝtato;
- ke la nuntempa praktiko pri ekskludo kaj detruo de la individuoj kaj de la homgrupoj estu vigle kontraŭbatalata.

NI PROPONAS,

- ke estu kreita SUPERNACIA DEMOKRATA FEDERA MONDA INSTITUCIO kun difinitaj sed efektivaj povoj, kiu disponos pri politikaj kaj juraj rimedoj por apliki en ĉiuj naci-ŝtatoj regularon garantiantan la rajton je kunekzistado de ĉiuj, en la fundamenta reciprokeco de la Homaj Rajtoj.

Monda Deklaro n-ro 15

1980

## TELEKOMUNIKAJ SATELITOJ

Kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj, rekte kaj demokrate elektitaj de elektantaro el 110 landoj,

NI KONSTATAS,

- ke la disvolvado de la telekomunikaj satelitoj donos, en proksima estonteco, la eblon dissendi parolan aŭ/kaj videblan informadon rekte ricevatan de la posedantoj de telericeviloj en la tuta mondo; ke tiu disvolvado riskas ege aliigi la sociajn kaj politikajn interhomajn rilatojn internaciskale;
- ke, en la nuna stato de la mondo, kelkaj ŝtatoj, dank' al siaj financaj rimedoj kaj teknologia frueco, kapablas alproprigi al si superinfluon sur la gentoj lokitaj en atingeblaj fremdaj landoj.

NI BEDAŬRAS,

- ke la Unuiĝintaj Nacioj, konsciaj pri tiu danĝero, ankoraŭ ne sukcesis ellabori principojn de regularo por la rekta dissendo per satelitoj.

NI ASERTAS,

- ke la radio-ondaj frekvencoj disponeblaj por la elsendo per satelitoj estas en limigita kvanto kaj estas posedaĵo de la homaro. Plie, la traktato de 1967 pri la esploro kaj ekspluatado de la superatmosfera spaco rajtigas nek ŝtaton, nek privatan organizon senrestrikte elsendi persatelitajn telekomunikaĵojn al fremda publiko.

NI PETAS,

- ke la instaladon de la telekomunikaj satelitoj faru, kaj ties regadon havu, Monda Federacia Aŭtoritato,

sole kompetenta por uzi la juran kapablon de la Homaro, kaj ties rimedojn estri.

- ke senprokraste estu entreprenata, laŭ peto de la Registaraj Organizoj, kiuj vidos en tio intereson, ekstudado pri publika fako internaciigita kaj kompleta (terinstalaĵoj, lanĉiloj kaj satelitoj) por universala persatelita teleelsendo, ekskluzive destinita por informado, defendo de la paco kaj pritraktado de la tezoj rilataj al federacia organizo de la mondo.

Monda Deklaro n-ro 16

1981

## TRINKEBLA AKVO

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate elektitaj al la Kongreso de la Popoloj per balotado el 110 landoj,

NI KONSTATAS, ke

- la rezervoj de trinkebla akvo estas en limigita kvanto,
- la kreskado de komfortaj civilizoj rezultigas supermezurajn poluadojn, lige kun reala malŝparo,
- la urba, sed ankaŭ kampara, industriiĝo kuntrenas kreskantajn poluadojn, kiuj pliampleksiĝas pro la senlima kreskado de la popolkvanto,
- la poluado al la akvo riske infektas grundon ĝis centoj da kilometroj for de sia fonto, ĉar la riveroj, kiuj transportas la akvon, havas basenojn ne ĉiam koincidantajn kun la landlimoj,
- la nuboj, fontoj de trinkebla akvo, povas enteni radioaktivajn elementojn, post nuklea eksplodo,
- malgraŭ kelkaj lokaj aŭ internaciaj strebadoj por mildigi tiajn nocivojn, la rezultoj estas nesufiĉaj, manke de monda politiko pri senpoluigado.

NI BEDAŬRAS,

- ke pli ol unu miliardo da homoj, senigitaj je trinkebla akvo, tiu komuna propraĵo, estas pro tiu manko viktimoj de teruraj malsanoj, kiuj okazigas ĉiujare milionojn da mortoj.

NI ASERTAS,

- ke havi je sia dispono sufiĉan kvanton da trinkebla akvo, tiu komuna propraĵo de la homaro, estas homa rajto.

Atendante demokratan federisman organizon de la mondo,

NI INSISTE PETAS

la kreadon de MONDA INSTITUCIO, kun plene difinitaj kaj efektivaj povoj, sole kapabla konservi tiun vivnecesan elementon por la vivo : LA AKVON.

Monda Deklaro n-ro 17

La 20-an de februaro 1982

## RAJTO INFORMIĜI

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj al la Kongreso de la Popoloj per balotado el 110 landoj,

NI AGNOSKAS la daŭrajn teknikajn progresojn pri komunikado disponigitajn al la homa rajto je informado kaj komunikado, fare de la teknologia kaj scienca esplorado.

NI KONSTATAS, tamen,

- Unuparte, la kreskantan alproprigon, fare de la politikaj kaj financaj potencoj, de la informagentejoj kaj mondaj sistemoj de parola kaj skriba gazetara dissendo;
- aliparte, la senpovecon de la internaciaj organizoj ellabori mondan ordon de informado, tamen necesan kaj realigeblan.

KONVINKITE, ke la defendo de la paco kaj de la justeco devenas de la protekto de la individuo kontraŭ la nociva kaj malbonuza ekspluatado de la modernaj informaj rimedoj;

PERSVADITE, fine, pri la efika valoro de tiuj rimedoj por formi kleran mondan politikan opinion;

NI BEDAŬRAS

- la nunan nesufiĉon de la naciaj kaj internaciaj elsendaj programoj, en radiofonio kaj televido, pri la informado koncerne la mondajn problemojn,
- la mankon, sur la internacia kampo, de rajto je rebato por efike certigi la defendon de la kolektivaj kaj unuopaj personoj.

KONSEKVENCE, ni insiste petas:

1° - la kutiman disponigon, fare de la aŭdvidaj amaskomunikiloj, de paroltempo, por ke la asocioj, organizoj neregistaraj, pacifismaj, homamaj, mondanismaj, ktp... povu informi la legantojn kaj ebligu al ili kunlaboron en la strebadoj al la paco kaj justeco en la monda komunumo ;

2° - la kreadon de Supernacia Monda Arbitracia Aŭtoritato, kapabla solvi la malakordojn, kiujn naskus la supraj aranĝoj.

Monda Deklaro n-ro 18

La 28-an de februaro 1982

## SANO

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj al la Kongreso de la Popoloj per baloto el 110 landoj,

KONSIDERE la dek punktojn en la Deklaro aprobita la 12-an de septembro 1978 de la Internacia Konferenco de la Monda Organizo por la Sano (M.O.S.), en Alma-Ata, pri la baza flegado,

KONVINKITE, ke ĉiu homo rajtas, interne de la vivkondiĉoj de sia vivgrupo, konservi sian staton de plena harmonio fizika kaj mensa, t.n. sano;

PERSVADITE, ke, konsidere la solidarecon devigatan de la nuna planeda situacio, la efektiva kaj ĝenerala agnosko de tiu rajto implicas de la ŝtatoj la rezignon de parto de sia suvereneco profite al la intereso de la monda komunumo;

NI ASERTAS, ke,

- la rajto je sano estas fundamenta kaj ke ĝia ĝuo estu egale garantiita por ĉiuj homgrupoj;
- tiu rajto kompensaĵe implicas la individuan devon submetiĝi al higieno kaj al preventa kaj kuraca medicino;
- la rajto kaj la devo ligitaj al la sano estu protektataj per politiko de la registaroj celanta la formadon kaj konservadon de prisana edukado. Tiu politiko konsideru la apartajn kredojn kaj aspirojn de la homgrupoj, kondiĉe ke tiuj ĉi respektu la fizikan kaj mensan tutecon de la individuoj.

NI BEDAŬRAS, ke la submeto al la absoluta suvereneco de la ŝtatoj malebligas al MOS profiti de la informoj, kiujn ĝi havas pri iu lando.

NI PETAS, konsekvence, ke ĉiu nacia politiko pri sano trovu en la helpa kaj kontrola servoj de la Monda Institucio por la Sano, havanta efektivajn povojn bone difinitajn, la garantiojn pri sia disvolviĝo kaj sia defendo kontraŭ la premoj de la financaj interesoj kaj la politikaj interagoj.

Monda Deklaro n-ro 19

La 28-an de novembro 1982

## CIVILA NUKLEA ENERGIO

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj al la Kongreso de la Popoloj per balotado el 110 landoj,

NI KONSTATAS jenon :

- La termonuklea energio nuntempe kovras malpli ol 10% de la monda energi-konsumado (ĉefe je la profito de la riĉaj landoj).
- Ĝis nun tiu uzado lasas nesolvita la problemon pri malaperigo de la radioaktivaj rubaĵoj. Tio kreas ververan danĝeron por la posteuloj.
- La elekto - fare de pluraj landoj - de ampleksa kreskado de la nuklea energio, sin mem pravigas same per trompa aserto pri energio-sendependo, kiel pro premado de plurnaciaj grupoj.
- La supermezuraj investoj por la nuklea energio prokrastas la esplorajn programojn pri nenocivaj energioj: suna, elhidrogena, biogasa, bioamasa, ventblova, geoterma, geostabiliva, per marcentraloj, tajdomotoraj, aeroterma...
- La nuklea politiko riskas konduki al polica socio pro danĝeraj defraŭdoj de fisieblaj materioj uzotaj de teroristoj.
- La krudmaterialoj por civila nuklea energio povas esti misdirektitaj ĝis militista uzado.

NI KONSIDERAS ankaŭ:

- ke, racie utiligante la fosiliajn materialojn, kun plena scio pri iliaj ekologiaj riskoj, kaj adoptante efikan mondan politikon pri limigo de la energi-malŝparoj, ni cert-

igos la transiron al uzado de nenocivaj energioj, kaj tio ebligos poste la forlason de la nuklea energio.

Konsekvence, NI PETAS

la kreadon de Monda Institucio Supernacia, kun efikaj difinitaj povoj por:

- iniciati mondskalajn studojn pri nenocivaj energioj,
- ellabori programon pri iompostioma malkonstruo de la ekzistantaj atomcentraloj.

Monda Deklaro n-ro 20

La 23-an de novembro 1982

## DEZERTIĜO

Kiel delegitoj rekte kaj demokrate, transnacie elektitaj al la Kongreso de la Popoloj per balotado el 110 landoj,

SCIANTE, ke la kreskadon de la dezertoj estigas:

- dezertiĝo pro la terenaj kaj klimataj fenomenoj,
- dezertiĝo rezultanta el la homa aktivado.

Tiuj ambaŭ fenomenoj hodiaŭ alprenas zorgodonan amplekson. En la ĉirkaŭdezertaj regionoj iliaj efikoj aldoniĝas.

NI KONSTATAS, ke:

- Tiu duobla fenomeno estas minaco kontraŭ la vivkondiĉoj de la homaro, eĉ iafoje kontraŭ ĝia vivo.
- La dezertiĝo estas mondskala fenomeno. Ĝi dependas de multaj politikaj, ekonomiaj, socikulturaj kaj ekologiaj kaŭzoj, kiujn la ŝtatpovoj ne kapablas mastri.
- Plejofte, la popoloj senpotencas proprateritorie super la pereigaj malekvilibroj: senarbarigo, lateritigo, grunda saligo, proventa kaj proakva erozioj.
- La maldiversigo de la kultiv-metodoj, specialigante laŭregione kaj tro intensive, multfoje kondukas al detruo de vundeblaj ekologiaj ekvilibroj.
- La troa engresigo sub duonsekaj klimatoj profunde kaj nocive perturbas la gresojn.

De la respondeculoj NI PETAS:

- Inventarii la ekologiajn sistemojn, kies modifo difektus senrimede ĉu la grundojn, ĉu la lokajn klimatojn. Cert-

igi ilian kontrolon kaj ilian protekton, t.e. reforstumi la deklivojn, krei, sur malfortaj grundoj, klimat-adaptitajn forstojn, ankaŭ reguligi la akvofluon.

- Inventarii la terenojn detruatajn per la mismastrumado homa, ilin klasi laŭ sciencaj kriterioj, kie la grundologiaj konsideroj estas metitaj antaŭ la kurtvidaj ekonomiaj : ĉesigi la troekspluatadon, protekti kontraŭ erozio, rekrei la humo-argilan grundaĵon...
- Same inventarii la agrojn.
- Decidi intensivajn produktadojn (malpliigo de la kulturalternojn, peza maŝinaro...), nur kiam oni certas ne modifi senrimede kaj nocive la agrokvaliton.
- Protekti la heĝojn kaj la arbaretojn, kaj racie malparceligi.
- Plani la valorigon de novaj grundoj nur laŭ la striktaj limoj de ilia produkto-kapabloj : nome, ne blinde agrigi arbarojn kaj stepojn, sed organizi ties valorigon racie, laŭ ilia propra vivreproduktiĝo.
- Ĉiukaze, ĉiam zorgi pri la cikla ekvilibriĝo de la humo, kiu kondiĉas la energidonan valoron de la grundo.
- Konsenti gravajn strebojn por eduki kaj respondecigi la homojn pri ilia medio, ilin mem ŝarĝante pri ĝia mastrumado.

Sed, KONSCIAJ pri la registara senpotenco de la nunaj ŝtatoj por solvi tiujn problemojn, kies solvo estas planedskala,

NI PETAS,

ĝis kiam estos kreita demokrata federa organizo de la mondo, kreadon de tutmonda supernacia institucio, kun difinitaj kaj efikaj povoj, por apliki reformojn, kiuj konservu la planedan humon. Nur tio antaŭsavos la teran produktivecon.

# *ALARMKRIO DE HIROŜIMO*

## ALARMKRIO DE HIROŜIMA

La vizito de la Hiroŝima-muzeo estas neeltenebla.

Kiel homoj tion atingis?

Kiel homoj sukcesigis tian senbridiĝon de perforto?

Kiel, malgraŭ tiaj manifestiĝoj, la homoj ankoraŭ kapablas stari ĉe la rando de la abismo de nuklea genocido?

Laŭ ni, mondanistoj, la kaŭzo de tia situacio kuŝas en la dispartigo de la gentoj pere de kvazaŭ sanktaj landlimoj.

Dum la scienca kaj teknika disvolviĝo tute logike devus konduki al malpliigo de la rolo atribuita al la landlimoj, la progreso de la industria erao pligravigis ilin. La ideologiaj kaj ekonomiaj fortoj ekservadis la naciismojn anstataŭ transpasi ilin.

Tial, starante antaŭ tiu maŭzoleo, ni petegas vin, kuniĝu kun ni en pripensado, kiu celu al nova organizo de la mondo, alia ol apudmeto de naci-ŝtatoj kun absoluta nacia suvereneco.

Post multaj eminentuloj, kiel la Nobel-premiitoj Albert CAMUS, Linus PAULING, Albert EINSTEIN, Alfred KASTLER, René CASSIN, Hideki YUKAWA; eminentaj politikistoj kiel Lord ATTLEE, Pandit NEHRU; la urbestroj de Hiroŝima, Shinzo HAMAI, Setsuo YAMADA, ni deklaras la neprecon de leĝo supernacia.

La Historio tion montras: ĉiufoje, kiam grupo de homoj akceptis komunan leĝon, iliaj intermilitoj ĉesis. Sekve, se, kiel la Mondanistoj tion rekomendas, supernacia leĝo, demokrate starigita, regus la mondon, la milito malaperus inter la ŝtatoj. Krome, eblus al la homaro ektrakti problemojn, kiuj nepre necesas por ĝia pluvivo, ekzemple, malsato, demografia eksplodo, energiokrizo, poluado, ĉiuj tiuj problemoj fronte al kiuj la naciŝtatoj pruvis sian nekapablecon.

La nunaj registaroj havas nek la jurajn nek la politikajn rimedojn, kiuj ebligus al ili efike decidi favore al la paco: mankas al la homaro la lasta etapo al demokratio, tiu de la mondo. Ja necesas, ke la popolo de la mondo elektu, planedskale, delegitojn por starigi tiun mondan leĝon, kiu sole povos savi nian specion, ĝin ŝirmante kontraŭ la nuklea genocido, kiu ĝin minacas en pli-malpli proksima estonteco.

Nepras denove procesi la absolutan suverenecon de la naci-ŝtatoj, jen la senco de la

ALARMKRIO DE HIROŜIMA.

# *KREAĴOJ*
# *DE LA*
# *KONGRESO DE LA POPOLOJ*

## INSTITUTO DE MONDANISTAJ STUDOJ

inaŭgurita la 9-an de julio 1978
ĉe la Mondanista Centro
de Kastelo La Lambertie

Tiu instituto celas prepari, per kreado de kulturaj kaj sciencaj elementoj de esplorado kaj formado disaj en la mondo:

- unuflanke, la enkondukon de mondanista temaro en la universitatajn programojn por supera instruo, en iliajn respektivajn fakojn;
- aliflanke, la kreadon de modela fakultato de politikaj kaj homaj sciencoj, aŭtonoma, kun mondanista kaj universala misio, rajtigita doni diplomojn.

Jen kiel devas funkcii tiu instituto:
En unua tempo, estos celataj, en la naciaj universitatoj aŭ fakultatoj, la kreadoj de instrubranĉoj ebligantaj enkonduki la mondanistan dimension en la tradiciajn instruojn. Samtempe estos organizataj en diversaj centroj disaj sur la diversaj kontinentoj, seminarioj ebligantaj la floradon de la mondanista esplorado. El tio devus eliri tuta aro da mondanistaj "majstroj".

Nuntempe oni alvokas al la kunlaboro de la - multegajprofesoroj de ĉiuj fakoj, kiuj pruvis sian aliĝon al nia mondkoncepto. Laŭ la kazoj kaj la deziroj, ili estas, aŭ konstantaj, aŭ invititaj profesoroj.

Estas celata la proksima rilato kun la organizaĵoj, institucioj aŭ asocioj prezentantaj celojn similajn al la niaj.

Prezidanto : Paul de la Pradelle

Estraranoj:

| | |
|---|---|
| Max Habicht | Renée Marchand |
| Marc Garcet | Guy Marchand |
| Andrée Gaymard-Rollet | Jacques Muhlethaler |
| Danièle Rey | Jean-François Rey |

## MONDANISTA GAZET-OFICEJO

Direktoro: Guy Marchand

Ĉiumonate folio en la franca, la angla kaj esperanto konigas al la ĉefaj komunikiloj en la mondo la mondanistan vidpunkton pri la karakterizaj aktualaj eventoj.

La Mondanista Gazet-Oficejo kreis ĵurnalistan karton, sur kies dorsflanko eblas legi:

TIU ĈI ĴURNALISTA KARTO ATESTAS,
KE LA KONCERNATO ESTAS SENPAGA ĴURNALISTO
MONDE DEMOKRATE KONTROLATA

Tiu ĉi karto respondas la demandojn metitajn en la provizora raporto de la komisiono de UNESKO pri la problemoj de la komunikado en la moderna mondo (septembro 1978).

Tiu ĉi karto defendas la **homan rajton komuniki** (art.94)
Ĝia ekzisto egaligas profesiecon kaj senpagecon:

PROFESIECO:

**La esprimlibero kontraŭdiras la profesiecon** (art. 102), ĉar tiu profesieco estas **kontrolata de privataj kaj financaj interesoj** (art. 103), kiuj ne estas demokrataj organismoj, aŭ de registaroj (art. 106), kiuj ofte rifuzas ideojn malsamajn al tiuj, kiujn ili memdefendas.

SENPAGECO:

**La organismoj bazitaj sur la memvola kaj senpaga asociiĝo ludas konsiderindan rolon sur la tereno de la komunikado** (art. 97).

La homa rajto komuniki donas al homo **esperojn pri socia transformo kaj politika ŝanĝo** (art. 7), **ĉar la homaro sin demandas pri la kondiĉoj de la pluvivo de la homa specio** (art. 4).

La Mondanista Gazet-Oficejo kreis ankaŭ sindikaton de senpagaj ĵurnalistoj.

# *ELEKTITAJ DELEGITOJ*

## LA ELEKTITAJ DELEGITOJ

### post la 8-a elekto (1987)

### Titoloj kaj programoj ĉe ilia elekto

**Marc GARCET (1973)**

**Titoloj:**

Mondcivitano - iama internacia prezidanto de la Internacia Civila Servo - Soldatserv-rifuzinto - Socialista kaj pacista aktivanto - Direktoro de centroj por mensa sano - Profesoro ĉe la Supera Instituto de Sociaj Sciencoj en Lieĝo (Belgio).

**Programo:**

En la nuna kunteksto de internaciaj streĉoj kaj fundamenta malegaleco inter riĉaj kaj malriĉaj landoj, proponas:

- disvolvadon de la dialogo kaj interŝanĝon inter gejunuloj de ĉiuj kontinentoj,
- la reciprokan kunlaboradon sur la ekonomia, socia kaj kultura terenoj, tra la internaciaj, kaj venonte mondaj, organizaĵoj; tutmondajn instituciojn orientitajn al la bazaj problemoj de juro kaj paco.

**Andrée GAYMARD-ROLLET (1973)**

**Titoloj:**

Honora licea instruistino - Esperantistino - Membro de la estraro de la franca centro de Mondcivitanoj kaj de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj - Membro de la asocio "Lernejo, Ilo de Paco" kaj de M.R.A.P. - Prezidanto de la Komisiono pri Instruado de la Mondcivitanoj - Verkisto pri la problemoj de Meza Oriento kaj de la liberigado de la virinoj.

**Programo:**

Subtenas ĉiajn formojn de pacistaj kaj neperfortaj agadoj por ĉesigi ĉiujn maljustaĵojn, kredas necese ataki samtempe ĉiujn frontojn: reorganizado de la

ekzistantaj internaciaj institucioj (ekz. UNO), kreado de supernaciaj organismoj, kaj ĉefe transformado de la mensoj per ĉiunivela edukado, por ke la homo ekkonsciu pri sia unueco en la diverseco, kaj ke kreiĝu vera mondcivitanismo.

**Lucile GREEN (1975)**

**Titoloj:**

Naskita en Ĉinio, kie ŝi vivis 18 jarojn - Doktoro pri filozofio. Instruis en Merrit College en Oakland (Kalifornio), sekcio de humanismaj studoj - Aŭtoro de "Homaj valoroj en la atomepoko" kaj de "La homa spirito en la atomepoko" - Membro de Mondfederalistoj, de "Usona Humanisto" kaj de "Asocio por Konvencio kaj Monda Parlamento".

**Programo:**

Vivinte en ambaŭ orienta kaj okcidenta duonsferoj, edukistino kaj ekologiistino, mi aplikos la lecionon de tio, kion mi povis lerni - Monda Komunumo necesas kaj postulas instituciojn kapablajn servi, ne siajn proprajn celojn, sed la tutmondan popolon. Tutmonda Konstitucio devus esti starigita, kiu submetu la praktikadon de la regpovo al la servo de la vivo, kaj protektu kontraŭ la ekspluatado kaj la misuzoj, kiuj malutilas al la komuna bono de la homaro.

**Max HABICHT (1975)**

**Titoloj:**

Svisa advokato - Iama oficisto de Ligo de Nacioj kaj de U.N.O. Kunfondinto de la Universala Movado por Mondfederacio - Aŭtoro de publicaĵoj pri internacia juro kaj mondfederalismo.

**Programo:**

Ĉefa celo: la abolicio de la milito per:

- fundamenta ŝanĝo de la nunaj politikaj strukturoj,
- la anstataŭigo de la ĝenerala asembleo de la registaroj de la mondo per tutmonda parlamento elektota per popola voĉdonado kaj kreonta novan mondan juron per plimulta voĉdono.

**Eizo ITOO (1977)**

**Titoloj:**

Direktoro de la doktrina instituto de Oomoto - Eldonisto de "Zinrui Aizen Shinbun" (monata gazeto de la Asocio por universalaj frateco kaj amo) - Prezidanto de la Asocio por disvastigado de Esperanto - Vicprezidanto de la Unuiĝo por Tutmonda Federacia Registaro - Prezidanto de la organizkomitato por la Kongreso de la 6 religioj de la Monda Federacio kaj prezidanto de la organizkomitato de la 60-a japana kongreso de Esperanto, ktp. - Vegetarano, esperantisto.

**Programo:**

Ni devas organizi demokratan mondan federacian komunumon per la ekkonscio pri nia planeda civitaneco, la universala amo kaj la frateco.

**Bhupendra KISHORE (BHUPPY) (1980)**

**Titoloj:**

Naskita en Hindio la 12-an de marto 1936 - Diplomito pri Artoj en Delhio - Volontulo de la Internacia Civila Servo en Svislando kaj Italio - Sekretario de la hindia, kaj poste azia, branĉo de I.C.S.

**Programo:**

Rekomendas neperfortan agadon ĉe ĉiuj niveloj, ek- de la individuo ĝis la monda skalo, per la premgrupoj, kiuj estas la neregistaraj organizaĵoj - Sugestas agadplanon "1980-2000", kiu, per diversaj etapoj, atingu Tutmondan Federacian Registaron en 2000. Sugestas simpligi niajn personajn vivmanierojn.

**Tsuruji KOTANI (1984)**

**Titoloj:**

Naskita en 1912 en Japanio. Diplomito pri Juro (universitato de Tokio) - Profesoro pri internacia juro en Hiroŝimo kaj aliaj universitatoj de pli ol 40 jaroj. Okupas ŝlosilpoziciojn en pluraj porpacaj movadoj en Japanio: Mondfederalistoj, UNO-asocio, ...Respond-

eculo de la japana centro de Mondcivitanoj. Libroj pri la problemoj de la internaciaj rilatoj.

**Programo:**

La alfrontado de la suverenaj ŝtatoj nepre kondukas al milito. U.N.O., konsistante el suverenaj ŝtatoj, ne povas abolicii la militon. La Monda Komunumo de la homoj, por kiuj la alfrontado inter suverenaj ŝtatoj ne havas sencon, povas eviti la militon. Interne de tiu Monda Komunumo la homoj povos praktiki siajn rajtojn.

**Hideaki KUWABARA (1986)**

**Titoloj:**

Naskiĝis en Japanio en 1923. Loĝas en Hiroŝimo. Diplomito de la Universitato de Literaturo kaj Sciencoj en Hiroŝimo - Prezidanto de la Oomoto-Asocio en Hiroŝimo - Direktoro de la Ligo de la Religiaj Grupoj en Hiroŝimo - Prezidanto de la Internacia Komitato de la japana Mondfederalista Asocio - Ĝenerala sekretario de la Buroo de la Mondanigitaj Urboj. - Membro de la Buroo de Mondcivitanoj - Kreis la Movadon de Mondfederalistoj en Hiroŝimo.

**Programo:**

Por abolicii la atomarmilaron kaj ĝenerale la militon, endas realigi la Tutmondan Federacion. Tiucele, ni devas starigi tutmondon ordon kaj tutmondan komunumon, kun tuthomara komuna celaro. Endas ankaŭ kunlabori kun diversaj movadoj, ekz. la movado de la planedcivitanoj.

**Paul de LA PRADELLE (1977)**

**Titoloj:**

Iama profesoro de la Juraj Fakultatoj kaj direktoro de la Instituto de Politikaj Studoj de Aikso-la-Provenca - Enkondukis en Francion la instruadon de Avia Juro (1938) - Delegito al la unuaj diplomataj konferencoj pri Marjuro (Ĝenevo, 1958-1960) - Aprobanto de

internacia arbitraciado, kreis kaj patronis studentan Internacian Justican Kortumon - Iama vicurbestro de Aikso.

**Programo:**

Mia konvinko pri internacia ordo bazita sur monda federacio naskiĝis el la preparado de mia doktora tezo (1928) pri "La Landlimo", kiun mi prezentis sub ĝia fundamenta aspekto de zono de pacaj rilatoj inter la nacioj. Mi defendas la rajtojn de la marspaco, komuna posedaĵo de la homaro, kontraŭ la kreskantaj pliampleksigoj de la teritoriaj suverenecoj. Mi rekomendas la internaciigon de la internaciaj aerlinioj kaj mi iniciatis, kun Guy Marchand, ETHERUNO-n (1956).

## Hazel Mc CALLION (1986)

**Titoloj:**

Naskiĝis en Port-Daniel, sur Gaspe-marrando (Kanado) - Unua virino elektita kiel prezidanto de la Komerca Ĉambro en Streetville kaj de ties distrikto. Urbestrino de Streetville ekde 1970 (reelektita en 1980, 82, 85) kaj elektita en la Regiona Konsilantaro de Mississauga en 1978. Internacie agnoskita, kiam ŝia nomo aperis en la "Who's who" de la amerikaj virinoj kiel unu el la jaraj amerikaj virinoj.

**Programo:**

Kiel urbestrino mi strebadas por ke ĉiuj civitanoj estu nutrataj, vestataj kaj ŝirmataj. Same devas esti en la tuta mondo. Ĉar mia urbo estas mondanigita, mi akceptas la taskon al mi proponitan de la Kongreso de la Popoloj, persvadi aliajn urbestrojn por ke ili mondanigu sian urbon. Mi opinias, ke venos la paco, kiam ni prizorgos ĉiujn kulturojn kaj konsideros la tutan mondon kiel nian vilaĝon.

**Renée MARCHAND (1969)**

**Titoloj:**
Ĝenerala sekretariino de la franca centro de Registrado de Mondcivitanoj - Membro de la estraro de la Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj kaj de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj.

**Programo:**
Aktivas por la ellaborado de monda konscio, notinde per edukado kaj per supernacia civila servo.

**Douglas MATTERN (1969)**

**Titoloj:**
Prezidanto de la unuaj laborkunsidoj por Monda Konstitucianta Konvencio, kaj por Monda Parlamento de la Popoloj (Interlaken, Wolfach) - Prezidanto de la Ligo de Mondcivitanoj (Kalifornio) - Direktora membro de la Komitato de urĝeco por Monda Registaro.

**Programo:**
Tiu kriza periodo de la historio postulas, ke ni dediĉu ĉiujn niajn fortojn por konstrui, kiaj ajn estas la necesaj klopodoj kaj oferoj, la unuecon de la mondo kaj la pacon per la mondcivitaneco kaj la starigado de Monda Registaro.

**Jacques MUHLETHALER**

**Titoloj:**
Prezidanto kaj fondinto de la monda asocio por "Lernejo, Ilo de Paco" - Prezidanto de la Svisa Ligo por la Homaj Rajtoj - Aŭtoro de vojaĝo-verkoj laŭ la spirito de monda humanismo - Membro de la svisa komitato de la Mondcivitanoj kaj de la Asocio por Monda Registaro, kaj ankaŭ de la Svisa Sanitara Centro, medicina helpo por Vjetnamio.

**Programo:**
Dediĉas sin al la disvolvado, pere de ĉiu lernejo en la mondo, de monda konscio: iel fari el ĉiu infano mondcivitanon. Strebas enkonduki en la lernplanojn de ĉiu

lando la instruadon de universalaj principoj de civitana eduko, praktika fundamento de monda etiko. La starigado de Monda Registaro dependas de la transformado de la hodiaŭaj mensoj.

**Sinjorino Rajan NEHRU**

**Titoloj:**

Iama prezidantino de la Federacio por la Unuiĝintaj Nacioj de Hindio - Membro de la plenumkonsilantaro de la Monda Federacio por la Unuiĝintaj Nacioj - Membro de la konsilantaro de la Universala Movado por Monda Federacio kaj de la Ligo de la Virinoj por Paco kaj Libero - Membro-fondinto de la hindia konsilantaro por la Protekto de Infanoj - Prezidantino de la Akademio de Artoj de Uttar Pradeŝ, Hindio - Verkisto pri la sociaj kaj pacistaj problemoj - Subskribinto de la Alvoko de la 13 Mondfamaj Mondcivitanoj.

**Programo:**

Rekomendas mondan aŭtoritaton por certigi la pacon, la liberon, la justecon kaj la politikan, socian kaj ekonomian progreson por la plej malfavorataj regionoj de la mondo.

**Muriel SARAGOUSSI**

**Titoloj:**

Naskita la 14-an de decembro 1958 - Brazila agronoma inĝenierino - Preparas tezon de doktoro-inĝeniero ĉe la supera agronomia lernejo de Rennes (F). Studentino ĉe la Instituto de Mondcivitanaj Studoj. Estrarano de la Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato - Neperfortulino, esperantistino.

**Programo:**

Proponas la disvastigadon de la mondcivitaneco per konkreta praktikado de la solidareco planedskale. La nerifutebla garantio de la pluraleco de la homaj socioj situas en la federalistaj kaj supernaciaj institucioj portitaj de la suvereneco de ĉiu individuo (serĉo de kohereco ĉe ĉiuj niveloj).

**Helen TUCKER (1980)**

**Titoloj:**

Diplomito de la universitato de Miĉigano kaj de Toronto - Instruistino ĉe la universitato de Toronto dum 30 jaroj - Memvola paclaboranto YM-YWCA - Respondeculo de la kanada centro de Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj - Sekretario de la Mondanista Asembleo - Prezidantino de la komisio "Edukado" de la Mondfederalistoj de Kanado.

**Programo:**

Ĉiu pacista persono devas prepari la trian jarmilon. Kiel mondcivitanino (n° 20727), aktivas por voĉdonigi al la Konstitucianta Monda Asembleo, al la Kongreso de la Popoloj kaj al la provizora Monda Parlamento de 1985. Necesas mondanista edukado, de la nivelo de la individuo ĝis tiu de Monda Demokrata Registaro.

## LA ELEKTITAJ ANSTATAŬAJ DELEGITOJ

### post la 8-a elekto (1987)

**Prachoomsuk ACHAVA-AMRUNG (1986)**

**Titoloj:**

Profesoro en la Universitato de Chulalongkorn (Tajlando). Prezidanto de la Internacia Asocio de Edukistoj por Tutmonda Paco - Ĉefredaktorino de la gazeto "Peace Progress" - Profesie laboras en priinstruada ekonomio - Redaktorino de "Esplorado kaj Disvolviĝo, Instruado de Scienco kaj Instruado al la Paco" - Ŝia biografio aperas en multaj "Who's who", ekzemple tiu de la intelektuloj.

**Programo:**

La militoj semas malfeliĉon kaj preparas la estontajn militojn kaj revoluciojn. "Se ci volas pacon, preparu militon" (Se vis pacem, para bellum) estas tute falsa ideo. Ĉiuj, kiuj edukas por la paco, male diras: "Se ci volas pacon, preparu pacon!" Ni nun preparu la pacon! EDUKI POR LA PACO, tio estas prepari la pacan socion kaj poste la morgaŭan tutmondan pacon.

**Josiane AH SIM (1986)**

**Titoloj:**

Naskiĝis en Maŭricio, la 22-an de junio 1954 - Diplomitino pri Mastrado de Entreprenoj (Universitato de Maŭricio) - Membro de Internacia Civila Servo (Maŭricia filio), nuntempe mezdaŭra volontulino en la internacia sekretariejo de I.C.S. kaj de ĝia brita filio IVS. - Mondcivitanino - Membro de Tutmonda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato - Oficistino en Ministerio de Socia Asekuro.

**Programo:**

Esti mondcivitanino, tio estas agnoski samajn rajtojn por ĉiu individuo sur la planedo. Kie oni estas, tie endas labori konkrete por atingi mondskalan solidarecon por kontentigi ĉies fundamentajn bezonojn.

**M.K. BANERJI (1984)**

**Titoloj:**

Diplomito pri Sciencoj kaj Beletro, diplomo pri Matematiko. Parolas angle, france, japane, hindie, bengale, urdue. Konsilisto pri importado kaj eksportado. Membro de la konsilantaro de la Universala Movado por Monda Federacio ekde 1963. Direktoro de la centro por regiono Sud-Azio de la azia centro de 1977 ĝis 1980. Prezidanto de la hindia organizaĵo de la Mondfederalistoj (Kalikato).

**Programo:**

Firme kredas je la idealo de unu mondo kaj je la universala planeda frateco. Vojaĝas en la tuta mondo por defendi tiujn ideojn. Deziras prelegi en la lernejoj kaj universitatoj pri mondanismo kaj kunlabori kun la hindia registaro kaj la hindiaj neregistaraj organizaĵoj, kiuj subtenas mondanismon.

**Henri CAINAUD (1971)**

**Titoloj:**

Mondcivitano - Esperantisto - Pacisto - Tutplaneda filozofo, defendanto de homo kaj naturo - Sindikatano.

**Programo:**

Laboras sur la universala kaj materia terenoj por la unuiĝo de la mondanismemaj penstendencoj kaj movadoj. Mondanigado kaj ĝemeligado, favorado al la artoj por certigi la estetikan celon de nia evoluado en ĉiuj politikaj, ekonomiaj kaj sociaj kampoj.

**Michel CEPEDE (1973)**

**Titoloj:**

Sendependa prezidanto de la konsilantaro de FAO (1969-1973). Profesoro ĉe la Nacia Agronomia Instituto - Membro de la franca subtenkomitato de la Mondcivitanoj - Prezidanto de la Monda Helpokorpuso.

**Programo:**

La interregistaraj organizaĵoj (ekz. tiuj de la UNO-fa-

milio) ne povas solvi la mondajn problemojn, kiel tiujn de la malsato kaj ĝenerale de la disvolvado, eĉ de la pluvivo de la homaro. Necesas demokrataj mondaj institucioj.

**Sinjorino Safi FAYE (1980)**

**Titoloj:**

Naskita en 1943 en Senegalio - Doktorino pri etnologio en la Universitato de Parizo - Lernejo Louis Lumière en Parizo - Reĝisorino, la unua afrikanino, kiu realigis filmojn: "La Passante" (La Pasantino, mallongdaŭra filmo), "Kaddu beykat" (Kampara letero), "Faj'Dal" (Avino, rakontu al ni), "Goob na nu" (La rikolto estas finita).

**Programo:**

Ĉiu individuo rajtas vivi, manĝi kaj trinki. Egoismo, ekspluatado, misuzo, perforto estas malaperigendaj vortoj. Kiel popolo de la mondo, ni pensu pri la plej senhavaj: la analfabetaj amasoj, kiuj povas nur vivaĉi, devas eliri el la senelirejo. Tion mi provas esprimi per miaj filmoj.

**Sigrid HANNISDAHL (1980)**

**Titoloj:**

Prezidantino de la Mondfederalista Asocio "En Verden" en Norvegio. Vicprezidantino de la konsilantaro de la universitata movado por Monda Federacio. Membro de la plenumkomitato de la Asocio por UNO de Norvegio - Komitatano de "U.N.A.C.W.W."

**Programo:**

Petas la egalecon de la rajtoj, bazitaj sur la homaj digneco kaj tuteco, por ĉiu kaj por ĉiuj, sur la terenoj de la raso, de la religio kaj de la sekso - Deziras favori la transnacian interkomprenon per la monda edukado. Rekomendas la ĉesigon de vetarmado kaj la plifortigon de Unuiĝintaj Nacioj.

**Lucien A. HARMEGNIES (1984)**

**Titoloj:**

Naskiĝis en 1941 - Triagradaj studoj en diversaj eŭropaj landoj (publika administracio, juro pri la internaciaj rilatoj, paco-sciencoj). Staĝoj pri diplomatio en UNO kaj AGECOOP. Komisiito pri eksteraj kaj internaciaj rilatoj de urbo Charleroi (Belgio). Iama vicprezidanto de la Junaj Mondfederalistoj - Edzo de sovetia civitanino.

**Programo:**

En nia epoko de ĝenerala krizo, responde al la kresko de streĉeco inter Oriento kaj Okcidento, al la perarmeaj intervenoj kaj al la prioritatoj por la ekstermteknologioj, al la netolerebla pludaŭro de malsato, subpremado, disrabado al la popoloj, la mondanista mesaĝo, kiu superas la diferencojn, estas pacista, egalista kaj liberiga.

**Alfred HASSLER (1973)**

**Titoloj:**

Plenumsekretario de la Movado Internacia por Repacigado, Usono - Ĝenerala sekretario de M.I.R. - Direktoro de "Daï Dong" kaj de la Internacia Komitato de Konscienco pri Vjetnamio - Membro de la konsilantaro kaj iama prezidanto de la Internacia Federacio por Malarmado kaj Paco - Aŭtoro de "Conscripts of Conscience" (1944-1971), "Diary of a Self-made Convict" (1954-1956), "Saïgon-U.S.A." (1970); multaj eseoj kaj artikoloj.

**Programo :**

Aktivas aparte kontraŭ la difektado de la medio, la malpliigado de la naturaj riĉaĵoj, la tropopolado, la malsato kaj la milito. Proponas prokrasti la aplikadon de la teknologiaj novaĵoj, kies efikoj estas neantaŭvideblaj, kaj kiuj ne estas nepre necesaj por la pluvivo de la homaro, rapide fari internaciajn interkonsentojn pri la kvalito de la medio, pli juste dispartigi la riĉaĵojn per malaltigo de la konsumnivelo de la privilegiaj klasoj.

**Pierre MARTIN (1971)**

**Titoloj:**

Soci-ekonomiisto servanta kooperativojn en Senegalio, iama eksperto de UNESKO por la edukado de la palestinaj rifuĝintoj - Pacista aktivanto de la Internacio de Militrifuzantoj kaj iniciatinto de la laborejoj de la Internacia Civila Servo en Afriko - Respondeculo de la Centro de registrado de la Mondcivitanoj por okcidenta Afriko.

**Programo:**

Volas konkretigi la mondcivitanecon unue por la rifuĝintoj kaj senŝtatanoj, rapide iniciati mondajn instituciojn sur terenoj, kie la naciaj juroj estas malkapablaj certigi la pacon kaj la bonfarton de ĉiuj rasoj.

**Hanna NEWCOMBE (1975)**

**Titoloj:**

Kunaŭtorino kun sia edzo de "Peace Research Abstracts Journal" kaj "Peace Research Reviews". Aŭtoro de "Proksimiĝo al Monda Registaro" - Pionirino de la mondanigado de kanadaj urboj - Iama prezidantino de la packomitato de la Kvakeroj - Vicprezidantino de la komitato por Monda Federacia Aŭtoritato - Aktivas ĉe la Universala Movado por Mondfederacio ĉe "World Constitution and Parliament Association" kaj ĉe "Emergency World Government Committee" - Kemiistino.

**Programo:**

La mondo bezonas mondan registaron pro pluraj kialoj: paco, poluo, popolado, malriĉeco kaj la damaĝoj, kiuj fontas el ili; tio fariĝis nun urĝa. La monda registaro povas esti atingita per pluraj rimedoj; en la nuno, necesas ilin ĉiujn provi: modifo al la ĉarto de UNO, Konstitucianta Asembleo de la Popoloj, mondanigado de la urboj, verkado de Konstitucio, inventado de sintenoj favoraj al la monda unueco.

**Devi PRASAD (1975)**

**Titoloj:**

Naskita en 1921 en Hindio - Universitato de Santiniketan (Tagore). Aliĝas en Sevagram al la grupo, kiu laboras sub la direktado de mahatmo Gandhi por starigi novan eduksistemon ĉe ĉiuj stadioj de la disvolvado de la individuo en socio. Estis dum 10 jaroj ĝenerala sekretario de la Internacio de Militrifuzantoj en Londono. Eldonisto de "War Resistance".

**Programo:**

Laboras por antaŭenigi la ideojn de neperforta revolucio: "satyagraha". Partoprenas en multaj kampanjoj kontraŭ la militoj kaj la perarmea regado de la grandaj ŝtatpotencoj super la malplimultoj. Organizas kampanjojn por la agnosko de la rifuzo al soldatservo, ĉefe interne de la komisiono de la Homaj Rajtoj de UNO. Partoprenas en konferencoj de la pacmovadoj por favori la interkomprenon inter Oriento kaj Okcidento. Deziras edukadon por senmilita mondo.

**Etienne RECLUS (1971)**

**Titoloj:**

Iama ĝenerala sekretario de la franca branĉo de la Internacia Civila Servo - Eŭropa sekretario de la Organizaĵo de la Urĝa Agado de I.C.S. dum naturaj katastrofoj - Sekretario por la ekfunkciigado de novaj projektoj de I.C.S. - Sekretario de la provizora komitato por Monda Helpagentejo dum naturaj katastrofoj. Membro de la Movado Internacia por Repacigado.

**Programo:**

Laboras por la starigado de vera monda servo al la kolektivo, anstataŭonta ĉiujn formojn de soldatservoj kaj internaciaj servoj. Aktivas por la monda organizado de la planedo, tra starigo de supernaciaj institucioj.

**Reinhart RUGE (1977)**

**Titoloj:**

Prezidanto de la Asocio por Konstitucio kaj Monda Parlamento - Membro de la plenumoficejo de la komitato por Monda Federacia Aŭtoritato - Organizis kampadejon por la Monda Olimpia Junularo - Civila inĝeniero, li laboris por la racia disvolvado de la hidraŭlikaj riĉaĵoj - Iama direktoro de la inĝeniera lernejo de Meksikio. Dediĉas sin al la starigado de Monda Konstitucianta Asembleo.

**Programo:**

Nur Monda Federacia Registaro, kie kunvenas ĉiuj nacioj kaj ĉiuj popoloj de la mondo, povas solvi niajn plej grandajn problemojn: TROPOPOLADO (elĉerpiĝo de la riĉaĵoj), MILITO, ARMEOJ kaj ARMILOJ (fordirektado de la riĉaĵoj celantaj nutraĵproduktadon, sekurecon kaj edukadon), POLUADO de la vivmedio, de la aero kaj de la akvo - Se la hom-specio ne povus unuiĝi en paca klopodo por starigi mondan federacian mondon, ĝi malaperus el planedo Tero antaŭ la fino de tiu ĉi jarcento.

**John ROBERTS (1971)**

**Titoloj:**

Prezidanto de la plenumkomitato de la Universala Movado por Mondfederacio kaj vicprezidanto de ĝia brita sekcio - Aŭtoro de broŝuroj pri la mondaj aferoj kaj la monda registaro, partoprenas en la revuo "World Federalist" - Antaŭe membro de la plenumkomitato de regiona sekcio de la Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (Britio) - Profesoro en la uiversitato de Laval (Kebekio).

**Programo:**

Bedaŭras la nunan dividon inter la "popolaj" kaj la "intelektaj" strategioj de tiuj, kiuj celas la mondan unuecon; deziras vidi la aperon de novaj ekkonsideroj

por kunigi ambaŭ metodojn. Deziras la unuiĝon de la Mondcivitanoj kaj de la Federalistoj por atingi mondan pacan movadon kun komuna estraro - Rezolute daŭrigi la strategiojn, kiuj kondukas al progreso, estante realistaj kaj efikaj.

**Ivan SUPEK (1977)**

**Titoloj:**
Profesoro pri filozofio kaj rektoro de la universitato de Zagreb, 1968-1972 - Rezistanto dum la dua mondmilito - Subskribinto de la unua alvoko kontraŭ la atombombo kaj por la monda unueco ĉe la Kongreso de la Pacbatalantoj en junio 1944 - Eseisto kaj humurverkisto - Subskribinto de la Alvoko de la 13 mondfamaj Mondcivitanoj en 1966.

**Programo:**
Rekomendas ĝeneralan kaj kompletan malarmadon en unuiĝita mondo - Kontrolo kaj modifo de la produktrimedoj kaj de la ekonomia sistemo (kaj de la disvolvoceloj) povas eviti la ekologian katastrofon - Necesas favori egalecon kaj liberecon, same koncerne la personon, kiel la demokratecon de la sociaj institucioj (partopreno de la laboristoj, memmastrumado) kaj toleremon kaj neperforton (krom en esceptaj cirkonstancoj).

# *ANEKSAĴOJ*

## DELEGITOJ ELEKTITAJ

## AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

Marc GARCET
Andrée GAYMARD-ROLLET
Lucile GREEN
Max HABICHT
Eizo ITOO
Bhupendra KISHORE
Tsuruji KOTANI
Hideaki KUWABARA
Paul de LA PRADELLE
Hazel Mc CALLION
Renée MARCHAND
Douglas MATTERN
Jacques MUHLETHALER
Rajan NEHRU
Muriel SARAGOUSSI
Helen TUCKER

## ANSTATAŬAJ DELEGITOJ

Prachoomsuk ACHAVA-AMRUNG
Josiane AH SIM
M.K. BANERJI
Henri CAINAUD
Michel CEPEDE
Safi FAYE
Sigrid HANNISDAHL
Lucien HARMEGNIES
Alfred HASSLER
Pierre MARTIN
Hanna NEWCOMBE
Devi PRASAD
Etienne RECLUS
Reinhart RUGE
John ROBERTS
Ivan SUPEK

## PREZIDIS LA KONGRESON DE LA POPOLOJ:

| | Prezidantoj | Vicprezidantoj |
|---|---|---|
| Jaroj 78/79 | Max Habicht | Andrée Gaymard-Rollet |
| 79/80 | Marc Garcet | Rajan Nehru |
| 80/81 | Eizo Itoo | Marc Garcet |
| 81/82 | Eizo Itoo | Marc Garcet |
| 82/83 | Lucile Green | Renée Marchand |
| 83/84 | Paul de la Pradelle | Helen Tucker |
| 84/85 | Douglas Mattern | Bhupendra Kishore |

**Ĝenerala Sekretario:** Guy Marchand

# KONGRESO DE LA POPOLOJ

## STATUTO

### I. DAŬRO KAJ KONSISTO

I.1. La Kongreso de la Popoloj estas antaŭbildo de tutmonda reprezenta asembleo kapabla starigi publikajn mondajn instituciojn.

I.2. La Kongreso de la Popoloj funkciados, ĝis ĝi estos certa pri la ekfunkciado de la monda supernacia aŭtoritato.

I.3. La Kongreso de la Popoloj konsistas el la reprezentantoj de la popoloj, elektitaj per la ĝenerala voĉdonado laŭ la reguloj precizigotaj en la interna regularo.

### II. CELOJ DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

II.1. Starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj, komunaj al ĉiuj homoj.

II.2. Proklami la neceson de publikaj Tutmondaj Institucioj kapablaj kontentigi tiujn bezonojn.

II.3. Difini:
- a) sur kiuj terenoj estas necesa la interveno de Tutmonda Institucio;
- b) kiuj transdonoj de kompetenteco profite al la publikaj Tutmondaj Institucioj, devos esti konsentitaj de la Naci-ŝtatoj;
- c) la procedurojn necesajn por la kreado de publikaj Tutmondaj Institucioj;
- d) la strukturon de la kreota Tutmonda Supernacia Federala Aŭtoritato.

II.4. Esprimi per Mondaj Deklaroj la opinion aŭ volon de la tutmonda popolo pri la eventoj koncernantaj la sorton de la homaro.

II.5. Interveni ĉe la registaroj aŭ la internaciaj instancoj pri la aktualaj mondproblemoj.

II.6. Pristudi la raportojn de fakuloj pri la projektoj de Tutmonda Institucio kaj esprimi sian opinion.

II.7. Prezenti antaŭprojekton de Tutmonda Federacia Konstitucio al la naciaj registaroj kaj parlamentoj, kaj al la diversaj internaciaj instancoj.

II.8. Ĉiel iniciati utile al la ekfunkciigo de demokrata Monda Parlamento, konsistanta i.a. el Ĉambro de la Tutmonda Popolo.

II.9. Celi la kunlaboradon kaj la kreadon de edukaj, informaj kaj kulturaj organismoj, favorantaj la ekkonsciigon pri universala solidareco.

## III. AGADRIMEDOJ

III.1. La Kongreso de la Popoloj malpermesas al si ĉian formon de perforto tuŝanta la korpan kaj mensan tutecon de la individuo.

III.2. La Kongreso de la Popoloj rajtas uzi ĉian metodon taŭgan laŭ la temoj kaj cirkonstancoj cele al la realigado de ĝia misio.

## KONGRESO DE LA POPOLOJ

## INTERNA REGULARO

***Antaŭparole*** *: La Kongreso de la Popoloj estas antaŭbildo de Tutmonda reprezenta Asembleo kapabla starigi Publikajn Tutmondajn Instituciojn.*

### I. KONSISTO KAJ VOĈDONO

I.1. La Kongreso de la Popoloj konsistas el reprezentantoj de la popoloj, elektitaj per ĝenerala voĉdono laŭ la reguloj precizigitaj en Art. III.

I.2. La reprezentantoj estas la delegitoj kaj la anstataŭaj delegitoj, kies respondecoj estas priskribitaj en Dokumento I (ĉi-kune).

I.3. "Delegitoj" estas deklaritaj la 2 kandidatoj, kiuj akiris ĉe ĉiu baloto la plej grandan nombron da voĉoj, kaj almenaŭ 25% de la voĉdonintaro.

I.4. "Anstataŭaj delegitoj" estas deklaritaj, laŭ la ordo, la 2 kandidatoj, kiuj akiris ĉe ĉiu baloto la plej grandan nombron da voĉoj post la du delegitoj - kaj tio, ĝis la elĉerpiĝo de la listo kongruanta kun la konsiderata baloto - kondiĉe, ke ili akiris almenaŭ 10% de la voĉdonintaro.

I.5. Kaze de morto, eksiĝo aŭ definitiva nekapablo de delegito, la anstataŭa delegito, kiu akiris la plej altan procenton da voĉoj en la tuto de la antaŭaj balotoj, fariĝas delegito.
Konsekvence, la kandidato (ne anstataŭa delegito), kiu akiris la plej altan procenton de la voĉoj en la tuto de la antaŭaj balotoj, fariĝas anstataŭa delegito.

I.6. Kaze de daŭra neaktivado de delegito, la ĝenerala Asembleo povos lin konsideri eksiĝinto. La koncernato, informita, povos sin turni al la venonta Asembleo.

I.7. La Kongreso de la Popoloj povos aldoni al si ekspertarojn por la ekzamenado de precizaj demandoj.

I.8. La delegitoj laŭrajte partoprenas en ĉiuj debatoj kaj havas decidajn voĉojn.

I.9. La anstataŭaj delegitoj rajte partoprenas en ĉiuj debatoj kaj havas konsilajn voĉojn. Kaze de portempa nekapablo, delegito povas transdoni sian povon al unu el la anstataŭaj delegitoj, kiu tiam havas decidan voĉon.

## II. DAŬRO

II.1. La Kongreso de la Popoloj funkciados, ĝis ĝi estos certa pri la ekfunkciado de la Monda Supernacia Federala Aŭtoritato.

## III. ELEKTO AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

III.1. La elekto al la Kongreso de la Popoloj okazas per sinsekvaj balotoj, ĝis ĉiu membro de la monda komunumo estis vokita ununuran fojon por voĉdono.

III.2. La planeda distrikto nun funkcianta kondukos, laŭ la progresado de la mondaneco, al divido en geografiajn distriktojn, enhavantajn po ĉirkaŭ 1 milono de la monda loĝantaro.

III.3. La intertempo inter du balotoj varias laŭ la organizeblo: proksimume 2 jaroj.

III.4. La balotojn povas organizi pluraj centroj komisiitaj de la Kongreso de la Popoloj.

III.5. Kontrolkomisiono estas nomumita de la Kongreso de la Popoloj.

III.6. Ĉiu homo, ĉu viro ĉu ino, aĝanta minimume 16 jarojn, estas voĉdonrajta.

III.7. La balotoj estas unufojaj, kun simpla plimulto.

III.8. La voĉdono estas senpaga.

## IV. KANDIDATIĜO AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

a) Kriterioj de elektebleco

IV.1. La Kongreso de la Popoloj estas malfermita al ĉiu persono, ĉu viro, ĉu virino, kiu kandidatas laŭ la preskribitaj formoj. Ĉiu kandidato povas elekti sian balotdistrikton kaj devas respondi jenajn kriteriojn de elektebleco:

IV.2. La kandidatoj devas membri de almenaŭ 2 jaroj en organizaĵo kun mondanista spirito.

IV.3. La kandidatoj devas aĝi minimume 25 jarojn.

b) Kandidatiĝo

IV.4. Kiu deziras kandidati, tiu devas tion fari skribe, menciante siajn nomon, kvaliton, aĝon, sekson kaj adreson, kaj subskribante sian peton.

IV.5. Ĉiun kandidatiĝon, por ĉiu baloto, akompanu financa kontribuo, kies sumo estas decidita de la komisiono difinita de Art. IV.7.

IV.6. La financa kontribuo celas pagi la kostojn de la diskonigado de la kandidateco fare de la sekretariejo, kaj parton de la kostoj de la elekto.

c) Elekto-kontrolkomisiono

IV.7. La kontrolkomisiono konsistas el la Buroo de la Plenumkomitato kaj el maksimume po unu reprezentanto de ĉiu organizaĵo aŭ komunumo partopreninta en la antaŭaj elektoj.

IV.8. La komisiono ekzamenas la kandidatiĝojn kaj decidas, ĉu ilin akcepti, ĉu ilin forĵeti, laŭ la artikoloj IV.1, IV.2, IV.3 kaj IV.4.

## V. INTERNAJ FUNKCIOJ DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

a) Elekto de la Plenumkomitato

V.1. La Kongreso de la Popoloj elektas interne de si Plenumkomitaton el almenaŭ 4 membroj, aŭ de iu

ajn oblo de 4.

V.2. Ĉiu delegito povas kandidati ĉe la deĵoranta Prezidanto.

V.3. La membroj de la Plenumkomitato estas elektitaj por 4-jara periodo.

V.4. Ĉiujare estas renovigata kvarono de la Plenumkomitato.

V.5. Por la unua elekto, la daŭro de la mandato por ĉiu membro de la Plenumkomitato estos inter 1 kaj 4 jaroj, per lotado.

b) Nomumado de la ĝenerala sekretario

V.6. La Kongreso de la Popoloj nomumas per elekto ĝeneralan sekretarion, kiu estu nek delegito, nek anstataŭa delegito.

V.7. La kandidatoj al la posteno de ĝenerala sekretario estas prezentataj de la Plenumkomitato.

V.8. La ĝenerala sekretario estas nomumata por renovigebla dujara periodo.

c) Financado

V.9. La Kongreso de la Popoloj decidas ĉion necesan por certigi la financajn rimedojn ebligantajn la realigadon de siaj celoj.

V.10. Tiu financado povas esti certigita per donacoj, subvencioj, diversaj enspezoj kaj monda imposto.

V.11. La sumo de la monda imposto estas decidata de la Kongreso de la Popoloj.

V.12. Povas esti submetitaj al tiu monda imposto geografiaj aŭ politikaj komunumoj, asocioj, individuoj.

## VI. KUNVENOJ DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

VI.1. Ĝenerala kunveno kun tritaga daŭro estas organizata almenaŭ unufoje jare, ĉiujare en malsama kontinento.

VI.2. La dato kaj loko de ĉiu kunveno estas sciigataj al la koncernatoj almenaŭ 6 monatojn antaŭe.

VI.3. La tagordo kaj la labordokumentoj estas disponigataj de la Plenumkomitato almenaŭ 2 monatojn antaŭe.

VI.4. Ĉiuj decidoj estas efektivaj per la simpla plimulto de la delegitoj, kondiĉe ke estu atingita kvorumo de 4/10.

## VII. LABORGRUPOJ INTERNE DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

VII.1. Laborgrupoj por prepari la kunvenojn de la Kongreso de la Popoloj libere kunvenas sur geografia bazo akordigebla kun la loĝloko de la delegitoj.

VII.2. Tiuj grupoj konsistas el delegitoj, anstataŭaj delegitoj kaj nomumitaj ekspertoj.

VII.3. La rezultoj de iliaj laboroj estas transdonataj al la Plenumkomitato.

## VIII. PLENUMKOMITATO

VIII.1. La Plenumkomitato elektas ene de si estraron konsistantan el:
- prezidanto,
- vicprezidanto,
- delegito al la financoj.

VIII.2. La ĝenerala sekretario estas rajta membro de la estraro, kun konsila voĉo.

VIII.3. La prezidanto kaj la vicprezidanto deĵoras dum unu jaro. Ilia mandato estas nerenovigebla dum tri jaroj.

VIII.4. La prezidanto prezidas la kunsidojn de la Plenumkomitato kaj reprezentas la Kongreson de la Popoloj en ties eksteraj rilatoj.

VIII.5. Se mankas la prezidanto, lin anstataŭas en liaj funkcioj la vicprezidanto.

VIII.6. La delegito al la financoj deĵoras dum renovigebla dujara periodo.

VIII.7. Li difinas la financan politikon de la Kongreso de la Popoloj kaj zorgas pri ĝia realigado.

VIII.8. La ĝenerala sekretario estas komisiita por plenumi la decidojn de la Plenumkomitato. Li iniciatas ĉion necesan sur la administracia tereno.

VIII.9. La Plenumkomitato decidas ĉion utilan por certigi la politikan kontinuecon de la Kongreso de la Popoloj inter du ĝiaj kunvenoj.

VIII.10. La Plenumkomitato preparas la kunvenojn de la Kongreso de la Popoloj kaj ĝin kunvokas.

VIII.11. Se necesas, la membroj de la estraro de la Plenumkomitato devas interkonsiliĝi por nepraj decidoj.

## IX. AGADRIMEDOJ (vidu § III de la Statuto)

## X. CELOJ DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ (vidu § II de la Statuto)

## XI. PROVIZORAJ ARANĜOJ

XI.1. Reference al la Art. III.5, jenaj organizaĵoj kaj kolektivoj estas instigataj partoprenigi siajn membrojn al la sinsekvaj balotoj:

a) la mondanistaj organizaĵoj,
b) la organizaĵoj laborantaj por paco, repacigado, interkompreno, interhoma amikeco,
c) la filozofiaj, sciencaj, teknikaj kaj profesiaj organizaĵoj fonditaj por antaŭenigi la scion pri la homo aŭ plibonigi ĝian vivkondiĉon,
d) la mondanigitaj komunumoj.

XI.2. Ĉiu baloto respondas al listo de elektontoj enhavanta almenaŭ 10 000 enskribitojn.

XI.3. La kontrolkomisiono zorgas por ekvilibro de la kandidatiĝoj, laŭ la nombro da delegitoj aŭ da kandidatoj de difinita nacieco aŭ membroj de difinita organizaĵo aŭ komunumo.

XI.4. Per escepto al la Art. VI.1., la loko de la ĝenerala Asembleo de la Kongreso de la Popoloj estas decidita de la Plenumkomitato almenaŭ 6 jarojn antaŭe.

## RESPONDECOJ DE LA DELEGITO ELEKTITA AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

*Per la Kongreso de la Popoloj ekfunkcias mondskala demokrateco.*

### 1. ANTAŬPAROLO

1.1. Ĉiu elektita delegito devas sin konsideri ero de nova tuto, do ligita al la sindevontigoj pri solidareco, kiuj rezultas el tiu situacio, al la voloj de la voĉdonintaro, kiu lin komisiis, kaj al la fideleco je la programo, sur kies bazo li estis elektita, por ebligi ĝian realigadon.

1.2. La anstataŭontoj, kiuj, sekve de mortoj aŭ eksiĝoj de la elektitaj delegitoj, estas alvokitaj por ilin anstataŭi, devas resti pretaj ekpreni tiujn respondecojn.

### 2. FUNKCIOJ

2.1. Aktivado: La funkcio de elektita delegito estas unue tiu de mondanism-aktivulo, al kiu estas konfidita mondskala respondeco. Kiel tia, li devus esti mobilizita por servi ĉian mondanistan agadon, disponebla por la koncernaj movadoj aŭ asocioj, por partopreni en kunvenoj aŭ manifestacioj, aŭ por ilin instigi. Estas tre grave, ke la elektita delegito profitigu el sia sperto sur ĉiuj terenoj al la esplor- aŭ stud-grupoj, al la laborkomisionoj. LI MORALE SIN DEVONTIGAS KONIGI EN ĈIA SITUACIO LA KONGRESON DE LA POPOLOJ, MENCIANTE SIAN TITOLON DE DELEGITO.

2.2. Propagando: La propaganda funkcio de la delegito konsistas ankaŭ en kiel eble pleja proksimiĝo al:
- la registaraj instancoj de la naci-ŝtatoj,
- la politikaj partioj,
- la sindikatoj,
- la internaciaj organismoj kun pacaj celoj,
- la informrimedoj.

por klopodi al venko de la mondanistaj vidpunktoj. Notinde pere de la elektitaj delegitoj devus esti diskonigataj la MONDAJ DEKLAROJ PRI LA AKTUALAJ PROBLEMOJ, kiuj periode estas prezentataj por ilia subskribo.

2.3. Politiko: La elektitaj delegitoj devas sin prepari por mondskale ludi politikan rolon, kio necesigas kontaktojn kun la ekzistantaj internaciaj organizantoj. Ŝajnas do tre utile, ke en la venonta fazo de preparado al la formado de Konstitucianta Asembleo de la Popoloj, elektitaj delegitoj estu membroj de neregistaraj organizaĵoj (aprobitaj aŭ ne), de fakaj agentejoj, de interregistaraj agentejoj, aŭ de ĉia alia internacia organismo, por tie prepari la spiritojn al mondanista koncepto pri la mastrumado de la planedo.

## 3. RILATOJ INTER LA ELEKTITAJ DELEGITOJ

3.1. La interŝanĝoj inter elektitaj delegitoj devas esti kiel eble plej oftaj kaj fruktodonaj:
- rektaj interŝanĝoj per korespondado,
- raportoj pri la entreprenitaj agadoj,
- farendaj konkludoj,
- renkontoj dum inform- aŭ labor-kunvenoj.

## *EKZEMPLO DE NOTICO*
## *SENDITA AL ĈIU VOĈDONONTO*

Estas 3 tipoj de notico
sendita samtempe kiel la voĉdonilo:
- unu por la mondanigitaj komunumoj (ĉi-sube)
- unu por la mondcivitanoj,
- unu por la membroj de la asocioj.

### KONGRESO DE LA POPOLOJ
### TRANSNACIA ELEKTO 1973

Mondanigita komunumo: MONT-SUR-MARCHIENNE

Sinjorino, Fraŭlino, Sinjoro,

Vi estas alvokita partopreni en la 3-a transnacia voĉdono por elekti DU NOVAJN DELEGITOJN al la Kongreso de la Popoloj. Kiel vi scias, se ĝi sukcesos atingi la tutan dezireblan amplekson, tiu aŭdigos la voĉon de la popoloj fronte al la registaroj de la naci-ŝtatoj. Ni situas nuntempe ĉe la komenco, kaj la du personoj, kiuj tiel estos elektitaj, kuniĝos kun la kvar unuaj delegitoj jam elektitaj en 1969 kaj 1972 : Josué de CASTRO kaj Jeanne HASLE, s-ino Rajan NEHRU kaj Jacques MUHLETHALER, kaj kun la membroj de la komitato por la Kongreso de la Popoloj, fondinto de la projekto. Nur kiam la nombro de la delegitoj atingos 10, la Kongreso povos valide kunsidi.

SAMTEMPE KIEL VI, ALIAJ VIROJ KAJ VIRINOJ EL DIVERSAJ LANDOJ, EN LA TUTA MONDO, ELEKTAS DU KANDIDATOJN EL INTER LA LISTO, KIU ESTAS PREZENTATA AL VI. LA ELEKTO ESTAS TRANSNACIA, T.E. ĜI NE KONSIDERAS LA KONCEPTON LANDLIMO, DO VI ESTAS ALVOKITA VOCDONI SEN KONSIDERI LA DEVENLANDON DE ĈIU KANDIDATO.

Tiu elekto reprezentas etapon, modestan sed decidigan, sur la vojo al mondaj institucioj. Ni estas persvaditaj, ke vi komprenas ĝian tutan gravecon, kaj ke vi sentos vin devigita voĉdoni.

La Komitato por la Kongreso de la Popoloj.

## NOTICO POR LA VOĈDONONTOJ

1 - Por esti voĉdononto, sufiĉas:

- aŭ esti sur la listo de la voĉdonantoj de la komunumo,

- aŭ esti sur la kroma listo starigita de la komunuma estraro kaj ampleksanta ĉiujn loĝantojn aĝantajn minimume 16 jarojn (inkluzive de la aliŝtatanoj).

2 - La elekto estas unufoja, per simpla plimulto.
La 2 kandidatoj akirintaj plej multe da voĉoj estos deklaritaj elektitaj kiel delegitoj al la Kongreso de la Popoloj por 10 jaroj.

La rezultojn publikigos la komitato por la Kongreso de la Popoloj.

3 - La voĉdono estas senpaga, kaj okazas, aŭ perkoresponde, aŭ per la antaŭviditaj voĉdonejoj.

4 - Krom la loĝantoj de la mondanigitaj komunumoj, la voĉdonontaro ampleksas mondcivitanojn kaj membrojn de akceptitaj movadoj establitaj en pluraj landoj. Sume la listo enhavas 20 000 voĉdonontojn.

5 - Neniu rajtas samtempe voĉdoni plurmotive (mondcivitano aŭ membro de partoprenanta movado), aŭ partopreni en la voĉdono, se li jam voĉdonis antaŭe.

6 - La voĉnombrado estos efektivigata ekde la 1-a de decembro 1973, en la ĉeesto de asignisto kaj de voĉdonkontrolantoj nomumitaj de la komitato por la Kongreso de la Popoloj. La maniero voĉnombri certigas la sekreton de la voĉdonado.

7 - Kaze de manko dum la mandato, la kandidato atinginta plej multe da voĉoj post la du delegitoj elektitaj per la koncerna baloto anstataŭos la mankanton.

## INSTRUKCIOJ POR LA VOĈDONADO

A - Metu krucon en la kvarangulojn, kiuj troviĝas sub la nomoj de la 2 kandidatoj, kiujn vi elektas (nur du krucoj sur la voĉdonilon, sen alia mencio).

B - Enŝovu la voĉdonilon en la bluan koverton.

C - Glufermu la bluan koverton.

TIAM VI POVAS ELEKTI INTER DU EBLOJ:

| Aŭ vin prezenti la: | Aŭ sendi vian voĉdonilon perkoresponde, jene: |
|---|---|
| Dimanĉon 18-an de novembro 1973<br>de la 9-a ĝis la 13-a horo<br>en unu el jenaj voĉdonejoj:<br>- Lernejo Centre, str. A. Max<br>- Lernejo Forêt, str. St Jacques<br>- Lernejo Gonceries, str. de France<br>- Lernejo Haies, str. de Longtry | D. Enŝovu la bluan koverton en en la blankan koverton.<br>E. Glufermu la blankan koverton.<br>F. Skribu vian nomon kaj vian adreson dorsflanke de la blanka koverto.<br>G. Afranku.<br>H. Plejeble rapide enpoŝtigu, tiel ke ĝi alvenu en Parizon antaŭ la 1-a de decembro 1973. |

Subskribregistrolibro funkcios en la voĉdonejoj por eviti la duoblajn voĉdonojn. Kaze de duobla voĉdono, estos konsiderata nur la voĉdono en la voĉdonujo.

**Noto:** La komitato por la Kongreso de la Popoloj volis, ke la voĉdono estu senpaga, kiel estas kutime por la naciaj balotoj. Sed tiu baloto okazigas gravajn elspezojn (200 000 belgajn frankojn), tial la libervolaj kontribuoj estos bonvenaj. Ili helpos prepari la venontajn balotojn antaŭviditajn por atingi la konstituon de reprezenta Kongreso de la Popoloj, konsistanta komence el la 10 unuaj elektitaj delegitoj.

*Estas konsilite alvenigi la libervolajn kontribuojn per* APARTA SENDO (ne en la voĉdonkoverto) al la

FONDUSO DE LA KOMITATO POR LA KONGRESO DE LA POPOLOJ
15 rue Victor Duruy, 75015 PARIS, Francio.

per poŝta aŭ banka ĉeko je la nomo "Fonduso por la komitato por la Kongreso de la Popoloj"
per internaciaj respondkuponoj aŭ per poŝmarkoj.

## *EKZEMPLO DE FLUGFOLIO*
## *POR LA LOĜANTOJ DE MONDANIGITA KOMUNUMO*

### TUTMONDA ELEKTO

### LOĜANTOJ DE MONT-SUR-MARCHIENNE

Proklamante la mondanigon de via komunumo, vi ekkonsciis pri via solidareco kun la loĝantaro de nia planedo. Tiu solidareco implicas devojn, sed ankaŭ rajtojn, inter kiuj estas la rajto mondskale aŭdigi vian voĉon, partoprenante EN LA VOĈDONO, KIU OKAZOS LA 18-AN DE NOVEMBRO 1973 por elekti du novajn delegitojn al la KONGRESO DE LA POPOLOJ.

Kial tiu nova elekto en nekutimaj kondiĉoj?

Tio estas tre simpla, vi estas reprezentataj

- skale de la komunumo, de viaj elektitaj komunumaj konsilantoj,
- skale de la ŝtato, de viaj elektitaj deputitoj kaj senatanoj,

sed, MONDSKALE, VI NE ESTAS REPREZENTATAJ DE ELEKTITAJ DELEGITOJ.

Tamen, gravaj demandoj koncernas ĉiujn loĝantojn de la mondo, kiu ajn estas ilia lando: danĝero de atoma milito, minaca disvolvado de la terpopolado, mizero de la landoj kun malsato, poluo de aero kaj akvo, tiom da minacoj pezas sur vi kiel sur la cetera homaro, kaj ili povas esti solvitaj nur mondskale, per MONDAJ INSTITUCIOJ, al kies starigado helpos via voĉdonilo, la 18-an de novembro 1973.

### KIU RAJTAS VOĈDONI?

Ĉiuj loĝantoj de MONT-SUR-MARCHIENNE aĝantaj pli ol 16 jarojn, kia ajn estas ilia ŝtataneco.

La elekto, en kiu vi partoprenos, estas nomata transnacia, ĉar kun vi partoprenas en ĝi voĉdonantoj el pli ol 50 nacioj.

## KIEL VOĈDONI?

Ĉiu voĉdononto enskribita en la ordinara aŭ kroma listo de voĉdonontoj ricevos voĉdonilon, klarigan noton, du kovertojn, inter kiuj unu surhavas nian adreson.

Vi tiam povos elekti:

- aŭ iri al unu el la voĉdonejoj, la 18-an de novembro 1973, de la 9-a ĝis la 13-a horo:
  - . Lernejo Centre, strato A. Max
  - . Lernejo Forêt, strato Saint-Jacques
  - . Lernejo Conceries, strato de France
  - . Lernejo Haies, strato de Longtry
- aŭ resendi tuj post la ricevo la voĉdonilon laŭ la klarigoj de la notico, enpoŝtigante la respondkoverton.

La 2 kandidatoj, kiuj estos elektitaj, havos la titolon "delegitoj elektitaj al la Kongreso de la Popoloj". Ili kuniĝos al la unuaj delegitoj elektitaj en 1969 kaj 1971, Josué de CASTRO, Jeanne HASLE, s-ino Rajan NEHRU kaj Jacques MUHLETHALER. Tiel ekformiĝos iom post iom, per sinsekvaj mondskalaj elektoj, la elektitaro de la popoloj de la mondo. kiun hieraŭ postulis Lordo ATTLEE, Albert CAMUS, Josué de CASTRO (elektita en 1969 al la Kongreso de la Popoloj), Albert EINSTEIN kaj Bertrand RUSSELL (Nobelpremiitoj),

kiun hodiaŭ postulas Alfred KASTLER, Nobelpremiito, pastro PIERRE, Jean ROSTAND...

PRUVU VIAN SOLIDARECON KUN LA ALIAJ MEMBROJ DE LA MONDA KOMUNUMO, proksimaj aŭ malproksimaj,

VOĈDONU, DIMANĈON LA 18-AN DE NOVEMBRO 1973.

## *EKZEMPLO DE FLUGFOLIO*
## *PRI LA KONGRESO DE LA POPOLOJ*

### PARTOPRENU EN LA 4-A TRANSNACIA ELEKTO AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

Du transnaciaj balotoj jam okazis por elekti 4 delegitojn al la Kongreso de la Popoloj.

Per la 1-a baloto en 1969 estis elektitaj Josué de CASTRO kaj Jeanne HASLE, per la 2-a baloto en 1971 estis elektitaj S-ino Rajan NEHRU kaj Jacques MUHLETHALER.

La voĉnombrado de la 3-a baloto okazis hodiaŭ vespere ĉe Mutualité.

En la 1-a baloto partoprenis mondcivitanoj el 87 landoj.

En la 2-a baloto, krom mondcivitanoj, partoprenis membroj de jenaj movadoj : Mondfederalistoj, Internacio de la Militrifuzantoj (Unuiĝo Pacista de Francio), Internacia Civila Servo, Movado Internacia por la Repacigado; kaj de 3 mondanigitaj komunumoj: Chassepierre en Belgio, Orval (Cher) kaj Vallon Pont d'Arc (Ardèche) en Francio.

En la 3-a baloto, krom la mondcivitanoj, partoprenis membroj de jenaj movadoj: Lernejo Ilo de Paco, Mondfederalistoj, Internacio de la Militrifuzantoj (Unuiĝo Pacista de Francio), Internacia Civila Servo ; kaj loĝantoj de mondanigitaj komunumoj: Anduze (Gard) en Francio kaj Mont-sur-Marchienne en Belgio.

### REGISTRIGU VIN NUN POR PARTOPRENI EN LA 4-A BALOTO

Kial tiu transnacia elekto?

Vi estas reprezentataj:

- skale de la komunumo, de viaj elektitaj komunumaj konsilantoj,
- skale de la departemento, de viaj elektitaj departementaj konsilantoj,
- skale de la ŝtato, de viaj elektitaj deputitoj kaj senatanoj,

sed **mondskale vi ne estas reprezentataj de elektitaj delegitoj.**

## CELOJ DE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

La mondanistoj konscias, ke ili ne povas fidi al la registaroj, nek al la parlamentoj, por kunvenigi la Konstituciantan Asembleon de la popoloj, kiu donos al la homaro la rimedojn por certigi la pacon kaj venki la mondan mizeron. Ili do devas ekpreni siajn aferojn per propraj manoj, kaj mem krei, progresive, la asembleon reprezentantan la tutmondan popolon: tio estas la baza ideo de la projektita KONGRESO DE LA POPOLOJ.

Pro la provizora malforteco de la mondanistoj, necesas antaŭvidi organismon, kiu povu rapide naskiĝi, kiu ekfunkciu malmultekoste, kiu laboru senbrue, kaj kiu kapablu disvolviĝi kiel organismo, por fariĝi, per sinsekvaj etapoj, konvene reprezenta.

Tuj kiam la Kongreso ekfunkcios, ĝi havos kiel ĉefajn taskojn: starigi la inventaron de la fundamentaj bezonoj komunaj al ĉiuj popoloj, difini la strukturojn de la kreota supernacia aŭtoritato, kaj indiki la estontajn grandajn liniojn de la mondaj institucioj, submeti la rezultojn de siaj laboroj al konsilantaro de fakuloj, kiun ĝi komisios por redakti la projekton de Monda Konstitucio.

**Laŭmezure kiel la Kongreso plifortiĝos, ĝi fariĝos pli kaj pli reprezenta kaj konsistigos, fronte al la naci-ŝtatoj:**

- **tribunon de la popoloj,**
- **tribunon por la eminentuloj,** kiuj ĝis nun devis izole aŭdigi siajn voĉojn.
- **tribunon por la organizaĵoj,** kiuj pruvis sian volon servi la homaron.

**Laŭmezure kiel la reprezenteco de tiu Kongreso pligrandiĝos, ĝia voĉo – nia voĉo – plifortiĝos, kaj eĉ la registaroj devos kalkuli kun tiu nova transnacia forto.**

.A.

# PROVIZORA REGULARO por la PARTOPRENO de la MOVADOJ en la BALOTADOJ

## 1 - ĜENERALAJOJ:

1.1. La voĉdonado estas unuopa: ĉiu voĉdononto, persone informita pri la projekto "Kongreso de la Popoloj", estas enskribita en balot-listo.

1.2. La voĉdono okazas perletere.

1.3. La voĉdono estas sekreta, ĝi estas senpaga, same por la voĉdononto, kiel por la movado.

1.4. La elekto okazas per plimulto da voĉoj en ununura baloto.

## 2 - PRAKTIKA ORGANIZADO:

La baloto estas organizata kiel la unua, okazinta de la 3.3 ĝis la 7.6.1969:

2.1. Dokumentoj:

2.1.1. Flava koverto estas sendata de Parizo. Ĝi entenas:

2.1.2. Blankan porrespondan koverton afrankitan per poŝtmarko de la tiea lando, kun la nomo de la sendonto, por ke oni povu, ĉe la ricevo, signi lin sur la balot-listo.

2.1.3. Bluan koverton por la voĉdonilo.

2.1.4. Dulingvan voĉdonilon.

2.2. Kontrolo fare de asignisto.

2.3. Loko: ĝis la kreado de subkomitatoj por la Kongreso de la Popoloj, la flavaj kovertoj estas enpoŝtigitaj. La nom-kontrolo kaj la malfermado okazas en Parizo aŭ aliloke dum unu sola tago.

## 3. SEKRETO pri la SLIPAROJ de la MOVADOJ:

3.1. Ĉiu movado nomumas respondeculon, prefere en Parizo. Tiu respondeculo partoprenas en ĉiuj kunvenoj preparantaj la koncernan baloton.

3.2. La respondeculo starigas la balot-liston laŭalfabete kaj laŭlande.

3.3. La respondeculo konservas tiun liston.

3.4. La Komitato por la Kongreso de la Popoloj transdonas al la respondeculo la listo-kongruan nombron da flavaj kovertoj afrankitaj; da blankaj respondkovertoj de la landoj; da bluaj kovertoj ; da voĉdoniloj (en kiuj estas petate, ke oni ne voĉdonu dufoje, se oni apartenas al du movadoj); da klarigaj noticoj (adreso de la respondeculo por financa alvoko).

3.5. La respondeculo devas skribi dorsflanke de la flavaj kovertoj kaj frontflanke de la blankaj, sian nomon kaj plenan adreson, kaj dorsflanke de la blankaj kovertoj, la nomon, personan nomon kaj urbon de la voĉdononto

3.6. La respondeculo kontroligas fare de asignisto, je la tago de la enpoŝtigo, la kovertojn ekspedo-pretajn. La asignisto plene rajtas per sondado kontroli la kovertojn por konstati, tute aparte, ke ili enhavas la antaŭviditajn dokumentojn kaj nenion alian (kio kondukus al nuligo de la voĉdonado de tiu movado).

3.7. La respondeculo enpoŝtigas la kovertojn en ĉeesto de reprezentanto de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj.

3.8. La respondeculo ricevas la blankajn respond-kovertojn, ilin klasas laŭlande kaj laŭalfabete, NE MALFERMANTE ILIN.

3.9. La tagon de la ĝenerala voĉnombrado, la respondeculo venas kun sia balot-listo kaj la blankaj respond-kovertoj.

3.10. La baloto okazas en la balotujo koncernanta la movadon.

3.11. La asignisto kontrolas la nombron da voĉdonantoj, la nombron da nulaj voĉdoniloj, la nombron laŭlande.

3.12. La respondeculo konservas la balot-liston kaj la blankajn kovertojn malplenajn por posta kontrolo far asignisto, se necese.

3.13. La balotujoj estas malfermataj kaj la bluaj sigelitaj kovertoj intermiksataj.

## 4 - VALIDECO DE LA PARTOPRENO

4.1. La Komitato por la Kongreso de la Popoloj konsideras, ke la partopreno estas valida, se la respondeculo ricevis pli ol 30% da blankaj respond-kovertoj; tiu procento estas kalkulita laŭ la balotlisto farita de la movado aŭ laŭ la parto de ĉi-lasta akceptita por la kon-

cerna balotado. Se la procento malsuperas tiun nombron, la movado ne estas rigardata kiel partopreninta la balotadon, sed se konsentas la movado, la voĉoj de ĝiaj membroj estas unuope validaj.

## 5 - KANDIDATECO

La movado rajtas prezenti kandidaton, se la nombro da enskribitoj de ĝia balotlisto sumas almenaŭ 10% de la tuta enskribitaro por la koncerna balotado.

.B.

# PROVIZORA REGULARO pri la VOĈDONADO de la GEOGRAFIAJ KOMUNUMOJ

## 1 - ANTAŬPAROLO

1.1. Tiu ĉi regularo koncernas la balotojn organizatajn sur la bazo de geografia komunumo (G.K.): vilaĝo, komunumo, urbo aŭ kvartalo, regiono, provinco, lando...

1.2. La procento de la partopreno postulata por la valideco de la voĉdono (15% de la loĝantaro) povas aspekti malforta, sed ĝi respondas tion, kio estas ĝenerale konstatata ĉe la elektoj organizataj de la regantaj aŭtoritatoj, eĉ en la industriaj landoj. Tiu procento estas difinita, ne rilate al la voĉdonantaro, sed rilate al la tuta loĝantaro, ĉar ĝia nombro estas pli facile akirebla kaj kontrolebla. En la plejmulto de la demokrataj landoj la voĉdonantaro konsistas el proksimume 50% de la loĝantaro, kaj tiu nombro varias laŭ la aĝo de la voĉdonrajto, la proporcio da ne-loĝantoj kaj aliŝtatanoj, ktp... Partopreno al la voĉdono de 30% de la voĉdonantaro, foje konstatita en Usono, ekzemple, respondas do al la voĉdonado de 15% de la loĝantaro.

## 2. ĜENERALAJ IDEOJ

2.1. La voĉdono estas individua. Ĉiuj potencialaj voĉdonontoj de la G.K. devas esti informitaj pri la projekto KONGRESO DE LA POPOLOJ, kaj ĉefe pri la transnacieco de la baloto.

2.2. La listo de la voĉdonontoj konsistas el:

- la listo kutime uzata de la ĝeneralaj balotoj en la koncerna ŝtato. Tiu listo estas donata de la respondeculoj de la G.K., kiuj tiel estas plene asociitaj al la organizado de la voĉdonado, eĉ se la G.K. ne estis antaŭe mondanigita.

- kroma listo, en kiu oni individue enskribas, pro ilia peto, la personojn ne menciitajn en la antaŭa listo: gejunuloj (aĝantaj pli ol 16 jarojn), aliŝtatanoj, nerezidantoj.

2.3. Se la tiel kompletigita listo formas pli ol 20% de la tuto de la enskribitoj por la koncerna baloto, nur parto de ĝi estas konservata. La partigo povas esti geografia aŭ alfabeta, sed ĉiukaze la selekto devas okazi per lotado, por eviti ĉian eblon de politika

aŭ ideologia manovro.

2.4. La voĉdono estas sekreta. Ĝi estas senpaga por la voĉdonanto kaj por la respondeculoj de la G.K.

2.5. La voĉdono estas unufoja, kun simpla plimulto.

2.6. La elekto devas esti transnacia, t.e. organizata samtempe en pluraj nacioj. Krome, por unu nacio la nombro da voĉdonrajtaj enskribitoj ne rajtas superi 30% de la tuto de la enskribitoj, en la tuta mondo por la G.K. por la koncerna elekto. Por G.K. alia ol nacio, tiu procento estas nur 20%, por eviti la superinfluon, eĉ portempan, de G.K. interne de la Kongreso de la Popoloj.

## 3. PRAKTIKA ORGANIZADO

3.1. Tiu organizado estas simila al tiu akceptita por la balotoj en la demokrataj landoj. Nome:

- klariga notico metita je la dispono de ĉiu voĉdononto
- izolbudo estas antaŭvidita
- legitimilo estas postulata ĉe la kontrolmarkado sur la listo de voĉdonantoj.

3.2. La nura notinda diferenco koncernas la voĉnombradon: por akcenti la transnaciecon de la voĉdonantaro, la kovertoj enhavantaj la voĉdonilojn de la diversaj G.K. estas miksitaj antaŭ la voĉnombrado, kiu estas centrigita (en Parizo dum la unuaj balotoj), kun la kutimaj antaŭzorgoj: sigelitaj voĉdonujoj, kontrolo fare de asignisto.

3.3. En kelkaj kazoj, studataj de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj, la voĉdono povas okazi perletere.

## 4. VALIDECO DE LA PARTOPRENO

4.1. La partopreno de la geografia komunumo (G.K.) estas valida, se 15% de la loĝantaro partoprenis en la baloto.

4.2. Se malpli ol 15% de la loĝantaro partoprenis en la baloto, la individuaj voĉdonoj restas validaj, sed oni konsideras, ke la G.K. kiel tia ne partoprenis en la elekto.

## 5. KANDIDATECOJ

5.1. La G.K. rajtas prezenti kandidaton, se la loĝantaro de tiu G.K. reprezentas almenaŭ 2% de la tuto de la loĝantaro rajtigita voĉ-

doni en iu baloto. Tiu kandidato devas esti akceptita de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj.

5.2. Neniu G.K. rajtas prezenti pli ol unu kandidaton.

5.3. La procento da kandidatoj de unu nacio ne rajtas atingi pli ol 30% de la tuta nombro da kandidatoj akceptitaj de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj.

# PROJEKTO DE TEKSTO POR LA BULTENOJ DE LA MOVADOJ PARTOPRENONTAJ EN ELEKTO AL LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

Dum la kunveno de la .... de sia estraro (aŭ de sia ĝenerala asembleo), nia movado decidis (aŭ akceptis, aŭ voĉdonis) asociiĝi al la Komitato por la Kongreso de la Popoloj por partopreni en la venonta transnacia elekto organizata de tiu Komitato.

Temas pri la elekto de du novaj tutmondaj delegitoj. La voĉdono estas individua. Ĝi okazas perletere. La baloto estas unufoja, kun simpla plimulto. Ĝi estas senpaga, t.e., ke vi devos nur enŝovi voĉdonilon en afrankitan koverton.

Ĉiuj niaj membroj, kiuj ne partoprenis en antaŭa elekto, povas partopreni en la baloto. Por tiu baloto, la Komitato por la Kongreso de la Popoloj, interkonsente kun ni, elektis aron de membroj, kies elekton decidis nia estraro (aŭ nia sekretariejo, aŭ...). Kompreneble, la aliaj membroj voĉdonos ĉe la venontaj elektoj.

Kio estas la projekto de "Kongreso de la Popoloj"? Ĝi estas provo por krei reprezenton de la tutmonda popolo, kiu estos, kiam ĝi estos vigla kaj grava, komisiita defendi la bezonojn komunajn al la tuta homaro, kaj ne la strikte naciajn bezonojn de la ŝtatoj kaj ŝtatanoj. Ĝi estas progresiva projekto, ĝi antaŭvidas sinsekvajn elektojn. Tiuj elektoj estas transnaciaj, t.e., ke la voĉdonontoj apartenas al kiel eble plej multe da nacioj, kaj voĉdonas sendepende de sia nacieco.

Unua baloto okazis en 1969; ĝi elektis kiel unuajn delegitojn al la Kongreso de la Popoloj: Josué de Castro kaj Jeanne Haslé.

Ni volonte konsentis pri la iniciato por la Kongreso de la Popoloj. La celoj de ĝia agado, kiu finfine devas

atingi Asembleon de la Popoloj kaj Mondajn Instituciojn, tre najbaras tiujn de nia asocio. Tial ni instigas ekde nun niajn membrojn (aŭ la elektontojn, kiujn ni elektis el inter niaj membroj) voĉdoni por la dua transnacia elekto al la Kongreso de la Popoloj.

Se granda plimulto de la elektontoj efektive partoprenos en la baloto, ili montros, ke nia asocio volas ĉeesti inter la pioniroj de mondanismo kaj sekve aprobas la decidon de nia estraro (aŭ de nia ĝenerala asembleo, aŭ...).

Ni antaŭdankas ilin pro ilia gesto.

La paperoj, kiujn la voĉdonontoj ricevos ĝustatempe, konigos al ili ĉiujn detalojn pri perletera voĉdonado.

Ili ekde nun en si mem sin devontigu voĉdoni.

## KIAL VOĈDONINTO NE DENOVE VOĈDONAS?

Vi estas ŝokita. Ĉar vi estas civitano konscia pri viaj devoj, vi voĉdonas ĉe ĉiuj sinsekvaj balotoj sur la komunuma, kantona, nacia tereno. Vi miras, ke vi ne rajtas denove voĉdoni en venonta elekto al la Kongreso de la Popoloj, ĉar vi jam voĉdonis en la antaŭa baloto.

Tio efektive meritas klarigon. Tiuj, kiuj subtenas la projekton "Kongreso de la Popoloj", ne havas la grandegajn materiajn rimedojn, pri kiuj cetere disponas la organizantoj de oficialaj elektoj. En la periodo de ekfunkcio, en kiu ni estas, ili devis rezigni, momente, limigi en la tempo la mandaton de la unuaj elektitoj. Sekve, en du sinsekvaj elektoj al la Kongreso de la Popoloj, ne temas, kiel en oficialaj elektoj, pri renovigo de la elektitaj reprezentantoj de la sama geografia areo. La celo estas, ke pliaj voĉdonantoj elektu novajn delegitojn. La Komitato por la Kongreso de la Popoloj voĉdonigas parton de la loĝantoj de la planedo, nur tial, ĉar ĝi ne havas la materian, nek financan, eblon voĉdonigi ĉiujn loĝantojn de la planedo en la sama tago.

# DISVOLVADO DE LA VOĈDONO

La praktika parto de la voĉdono estas jene organizata:

Ĉiu voĉdononto ricevas en flava koverto:

- blankan koverton afrankitan per poŝtmarkoj de la lando, en kiu troviĝas la voĉdononto, por ke la voĉdono estu senpaga, kiel ĉiu voĉdono en demokrata lando.
- bluan koverton, en kiun la voĉdonanto metas la voĉdonilon. Tiu koverto estas glufermita kaj sen surskribo estas metata en la blankan koverton.
- klarigan noticon (modelo estas menciita sur paĝo 107 pri la mondanigitaj komunumoj. Modeloj preskaŭ samaj ekzistas por la mondcivitanoj kaj por la organizaĵoj, kiuj partoprenas en tiuj elektoj).
- voĉdonilon. Ĝi konsistas el folio A4, kun la antaŭa flanko en la franca lingvo kaj la dorsflanko en la angla lingvo (ĉiuj voĉdoniloj kompreneble estas la samaj por ĉiuj voĉdonontoj en la tuta mondo).

Sur la voĉdonilo troviĝas la 8 kandidatoj laŭ alfabeta listo: sub ĉiu nomo faketo, kie oni metas krucon por la elektata kandidato. Oni elektas 2 kandidatojn. Sed se la voĉdonilo havas pli ol 2 krucojn, ĝi estas nula.

Maldekstre de la nomo, la kandidato mencias per kelkaj linioj siajn titolojn, kaj dekstre li mencias sian programon.

**Noto:**

La blanka koverto surhavas kompreneble sur la antaŭa flanko la nomon kaj adreson de la Komitato por la Kongreso de la Popoloj, sed ĉefe, dorsflanke, la nomon kaj adreson de la voĉdononto, por ke oni povu kontrolmarki sur la listo de la voĉdonontoj, kiam la koverto revenas.

Tri monatojn post la sendado de la flavaj kovertoj al la voĉdonontoj, okazas la voĉdonado kaj voĉnombrado per la reveno de la blankaj kovertoj. La Komitato por la Kongreso de la Popoloj opiniis, ke limtempo de tri monatoj necesas, sed sufiĉas, por ke la kovertoj havu la tempon iri al la diversaj landoj de la mondo kaj reveni.

Kiel en ĉiu demokrata baloto, la voĉdonado estas publika, kaj krome la Komitato por la Kongreso de la Popoloj kontroligas la disvolvadon per asignisto.

Du distingaj operacioj okazas samtempe:

la voĉdono kaj la voĉnombrado.

Ambaŭ operacioj estas preparitaj ĝis la plej eta detalo per serio da folioj disdonitaj al la aktivantoj:

Foliaro 1: Nomumado de la respondeculo de la voĉdonejo, de la respondeculoj pri la tabloj, kie troviĝas la voĉdonujoj, de la respondeculo pri la ritmo de la operacioj, de la kontestoj, de la materialo, de la dokumentoj kaj de la gazetaro. Nomumado de la tabloprezidantoj kaj de la asesoroj.

Foliaro 2: Listo de la materialo:

Rolo de la respondeculoj, de la prezidantoj kaj de la asesoroj. Kontrolmarkado sur la listo de voĉdonontoj.
Malfermo de la blankaj kovertoj, el kiuj oni prenas la bluan voĉdonkoverton.
La prezidanto metas la bluan koverton en la voĉdonujon, dirante: "Voĉdonis".

Foliaro 3: Ĝi estas la protokolo pri la voĉdono kun jenaj rubrikoj: numero de la paĝo de la listo de voĉdonontoj, nombro da enskribitoj, de voĉdonintoj, de nulaj voĉoj, de kontestoj, de tiuj, kiuj voĉdonis en aliaj lokoj, nomo de la prezidanto(j) kaj subskriboj.

Foliaro 4: Voĉnombrado. Ĉiuj bluaj kovertoj el la diversaj voĉdonujoj estas miksitaj.
La kovertoj, po 100, estas donataj al la tabloprezidantoj, la voĉnombranto malfermas la bluajn kovertojn kaj konigas la rezulton de la voĉdono.

Foliaro 5: La protokolo pri la voĉnombrado mencias la kandidatojn kaj la tuton de la voĉoj, kiujn ĉiu ricevis.
Ankaŭ la nulaj voĉoj kaj la kontestoj estas menciataj.
La prezidanto subskribas la protokolon.

Foliaro 6: Resuma folio pri la voĉnombrado, kiu mencios poste la tutan nombron da kovertoj, voĉdoniloj, nulaj voĉoj kaj kontestoj, kaj de tiuj, kiuj voĉdonis en aliaj lokoj.
La du elektitoj estas tiuj, kiuj havas la plej grandan nombron da voĉoj, kaj la du postaj estas anstataŭontoj.

**LISTOJ DE VOĈDONONTOJ**

Listoj de voĉdonontoj por la elektoj al la Kongreso de la Popoloj ĉirkaŭiras kaj kolektas la nomojn kaj adresojn de la personoj dezirantaj partopreni en tiuj elektoj, sen alia devo iliaflanke.

# ENHAVO


Kio estas Mondanismo 3

La iniciatintoj 4

Enkonduko 5

Kial la Kongreso de la Popoloj? 6

Celoj 9

Historio 10

70 000 voĉdonintoj 13

Rezultoj de la unuaj balotoj 15

Deklaro de Josué de Castro 24

Mondaj Deklaroj 29

Alvoko de la Dek 41

Alarmkrio de Hiroŝimo 65

Kreaĵoj de la Kongreso de la Popoloj

- Instituto de Mondanistaj Studoj 69
- Mondanista Gazet-Oficejo 70
- Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato 71

La elektitaj delegitoj 75

Prezidado de la Kongreso de la Popoloj 93

## ANEKSAĴOJ:


Statuto 95

Interna Regularo 97

Notico por la voĉdonontoj 106

Du ekzemploj de flugfolioj 109

Regularo por la Movadoj 113

Regularo por la Komunumoj 116

Kial voĉdoninto ne denove voĉdonas? 121

Disvolvado de la voĉdono 122

Foliaroj 123

Listoj de voĉdonontoj 124